

trimestriel

4^{ème}
trimestre
2007

LA INFORMILO

N° 140

décembre
2007



l'espéranto



la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto



la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

éditeur

**ESPERANTO
FRANCE-EST**

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale
ESPERANTO

regroupant
les départements
Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture
« Philippe Desforges »
27, rue de la République
FR - 54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

annuel / jara

12 €

eksterlando

16 €



Violette WALTER procède au partage délicat du gigantesque
gâteau que vont déguster les quelque quatre-vingt participants du
62^{ème} stage de « France-Est »

A ses côtés, Gilbert STAMMBACH, nouveau président, dont on
fait à la même date, le propre anniversaire, évènement
également concrétisé par une autre friandise dont l'originalité est
relatée avec humour dans le compte-rendu habituel du stage...

Bonne lecture !

Le club mériterait son entrée dans le livre des records ! Il y a là une preuve indiscutable de la pérennité et du dynamisme de la langue internationale... La "Asocio Strasburga de Esperanto", aujourd'hui "Strasburgo-Esperanto" <<http://esperantostrasbourg.free.fr>> n'a-t-elle pas en effet été confrontée durant près d'un siècle à deux annexions et à deux conflits mondiaux !

Une de ses dernières audaces : réussir à s'insérer dans l'éventail des dix langues de commentaires sonores proposés aux touristes lors d'une croisière intra-urbaine en bateaux-mouches ! Nos lecteurs pourront même par anticipation visiter la cité... grâce à un audio-guide "virtuel" ! Références dans un article spécifique inclus ci-après...

dans ce bulletin, votre fiche d'adhésion au 63^{ème} stage régional d'espéranto
VIGY (Moselle) – 2 / 3 / 4 mai 2008



Heureuse et fructueuse année 2008 à tous nos lecteurs

Espéranto France-Est	esperanto France-Est	Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la Internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Pol DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC tel. (+33) 03.29.79.01.44 poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto <i>Président</i>	S-ro Gilbert STAMMBACH 24, rue Albert Zimmer 67610 LA WANTZENAU	03.88.96.67.59	gilbert.stammbach@mageos.com
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag07@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro Pol DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	03.29.79.01.44	pol.denis@orange.fr
Junul-respondeculino <i>Responsable Jeunes</i>	F-ino Violette WALTHER 8, rue Philippe Rueff 67800 BISCHHEIM	09 54 86 08 30	walther.violette@wanadoo.fr
Junul-respondeculo <i>Responsable Jeunes</i>	S-ro Frédéric PORRETTI 48, rue de la ferme 68110 ILLZACH	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
PKK <i>Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	Liliane.Bersweiler@ac-nancy-metz.fr
<i>Assesseurs</i>	S-ino Marie-Claude BOREGGIO	03.88.96.47.26	marie-claude.boreggio@wanadoo.fr
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	F-ino Lucile GEREMIA		lucile.geremia@wanadoo.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille-hurstel@free.fr
	S-ro Robert KUENY	03.89.82.37.62	robert.kueny@orange.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr

Abono al La Informilo →	Francio: 12 eŭroj Eksterlando: 16 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per giro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

SOMMAIRE

pages 2 ours	26 Sarreguemines
3 / 8 stage VIGY	27 / 29 J. Lada
9 / 10 conférence OSIEK	30 / 33 Vinilkosmo
semaine Méditerranée	34 Libroservo
11 / 23 comptes-rendus été	35 / 37 pages trésorier
24 article de presse	38 / 39 pages détente
25 carquette anglaise	40 fototeko

ISSN 0291 6037 trimestriel
bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle
Espéranto France-Est
MJC Philippe Desforges – 27 rue de la République
54000 NANCY
Directeur de la publication : **Gilbert STAMMBACH**
Rédacteur : **Pol DENIS**
dépôt légal : 31 décembre 2007
imprimé par l'Office Central de Coopération à l'Ecole
Place de l'Ecole Normale 55000 BAR-le-DUC
N° CPPAP : **0409 G 83517**

Dum nia lasta komitatkunsido, ni iom cerbumis pri la rolo kaj celoj de nia federacio... Fojfoje indas preni iom da distanco al niaj kutimaj agadoj kaj starigi bazajn demandojn por tiamaniere provi agadi ĉiam pli profesie... En Francio, certe kiel en aliaj landoj, la esperantaj asocioj prezentiĝas laŭ 3 niveloj : la lokaj grupoj, la inter-regionaj federacioj, kaj la nacia landa asocio. Ĉiuj havas propajn efikojn kaj malsamajn rolojn. Nia federacio situas inter UFE, la landa asocio, kaj la lokaj orient-francaj kluboj, kiuj plej ofte rilatas kun nia orienta federacio.

Kio do estas la rolo de federacio ? Certe, spontane, oni sentas, ke temas pri ligi la lokajn asociojn, faciligante la cirkuladon de informoj inter ili. La federacio nepre ankaŭ agadas "vertikale" inter UFE kaj la lokaj asocioj. Evidentiĝas ke la landa asocio bezonas informojn plugitaj de la lokaj asocioj kaj inverse tiuj lastaj ne agadas nur per si-mem, sed en iu kadro. Iel kiel la rusaj pupoj kiuj enŝoviĝas unu en la aliaj, sen tamen malpermesi necesan aŭtonomion. Se ni deziras doni al la mondo allogan vizaĝon de nia lingvo, ni nepre devas agadi kune, plej profesie kaj harmonie.

Bunta rolo por efikaj agadoj : nia federacio estas je via dispono

Sed cirkuligi informojn ne sufiĉas por kreskigi nian movadon. Niaj federaciaj spertoj devus helpi al izolitaj esperantistoj por krei oficialajn laŭleĝajn asociojn kaj kiel eble plej efike instigi ilin agadi en nia kadro, necese malfermita. Ni havas sufiĉe da sperto por taŭge konsili ĉiujn, kiuj deziras starigi novan klubon.

Agadi profesie signifas ankaŭ pripensi kiamaniere varbi ekstere aŭ rilati kun la ĵurnalistoj. La federacio povas pri tio helpi ĉar nia baza mesaĝo, niaj kutimaj argumentoj pri Esperanto estas ofte la samaj. Do kial reverki ion kiu bone kaj jam taŭge funkciis en aliaj lokoj ? Kial reverki tekstojn se similaj jam ekzistas ? Kaj kial preni la riskon doni maltaŭgan signon ekstere ? ...

... sekvo interne de la bulteno

sekvo de " angulo de la prezidanto "

Agadi profesie, harmonie, ĉiu en sia sfero...

La nuna plej grava ligo inter ni estas "la Informilo". Ĝi delonge kunigas ne nur la klubojn sed ankaŭ esperantistojn, kiuj ne agadas en iu asocia kadro. Ĝi estas ofte eĉ legata kaj aprezata ekster la sfero de nia federacio. Ni povas disponigi al ĉiuj kluboj, laŭ bezono, unu tutan paĝon por anonci agadojn, instigi proponojn, prezenti iliajn spertojn.. Je via dispono !

Kompreneble, nuntempe ne vere eblas efike komuniki sen "ret-ejo". Nia venonta baldaŭa agado estas repripensi la retejon de nia federacio kaj ĉefe reaktualigi ĝiajn informojn. La rolo de la federacio ankaŭ tuŝas la helpon pri petoj por subvencioj, pri asekureco dum lokaj agadoj, pri organizado de tagaj staĝoj, mallongaj renkontiĝoj laŭ temoj, ekzamenoj... proponataj de lokaj asocioj. Ni ne forgesu, ke ni disponas pri inda libroservo, kaj pri ekspozicio, kiu moderne kaj trafefe prezentas Esperanton. Temas pri 12 paneloj, kiuj taŭge prezentas la lingvajn problemojn, la eblajn solvojn kaj inter tiuj solvoj la plej indan, Esperanto. Tiuj paneloj estas je via dispono. Ne hezitu uzi ilin en taŭga publika loko !

Se ni kune, bonordigite agadas, ni certe havas multe pli da efiko ol individue. Nepre ni kopiu tion, kiu jam donis belajn fruktojn aliloke. Viaj proponoj estas tute bonvenaj kaj ni certe ne forgesu, ke temas ankaŭ pri plezuro, pri hobiaj kaj amikaj renkontiĝoj.

La tuta komitato estas je via dispono kaj deziras al vi, al via familio plej bonan novan jaron... ..

Gilbert STAMMBACH

Robert DURAND

Bedaŭrinde forpasis en EPINAL, la 3an de novembro, nia malnova kaj estimata amiko Robert DURAND.

Ĝisoste esperantisto, li helpis, dum multaj jaroj komencantojn kaj progresantojn en nia departemento Vosges. Lia erudicio, lia originaleco lasis spurojn en la menso de ĉiuj, kiuj renkontis lin. Li ofte diskutis pri vortprecizo aŭ pravigo de iu gramatika regulo ; ni, kelkfoje, ne samopiniis kiel li... kaj lia respondo ĉiam estis neapelaciebla : « Dependas de via sentebleco » !

Por pli proze paroli, vogeaj esperantistoj neniam forgesos tiujn simpatiajn kunvenetojn en lia ligno-dometo en Hadol, ĉar, post la laboro, ĉiuj gustumis la frandajn mirabeltortojn kuiritajn de lia afabla edzino.

Vogeaj esperantistoj kondolencas al liaj geinfanoj, genepoj kaj al lia fratino Jeannine.

Robert COLIN

... En nia grupo de Gérardmer, ni ĉiuj estimis lin. Kun sia aspekto de "Profesoro Tournesol", li estis tre inteligenta, pensema kaj afabla viro. Li ankoraŭ partoprenis en kelkaj lokaj esperantistaj aranĝoj dum tiuj lastaj jaroj. Ĉe la fino, restis nur vizitoj de esperantistoj aŭ telefon-vokoj de ili por ĝojigi lin, kaj li tre afable respondis en esperanto. Mi ege ŝatis lin. Ĉar li estis liber-pensulo kaj liber-kredanto, lia funebra ceremonio okazis diskrete sen publika anonco, kaj la anonco aperis poste, sekve neniu esperantisto povis omaĝi al li. Kompreneble, ni faros tion nun.

Ginette MARTIN



Meze de la bildo la fondinto S-ro Müller

... 1907, für die Anhänger und Vorkämpfer des Esperanto, der internationalen Hilfssprache, ein wichtiges Jahr. Es sollte das Jahr der Prüfung sein, ob Esperanto den wilden Anstürmen feindlicher Mächte standhalten würde. Siegreich ging es aus dem Kampf hervor.

In dieses bewegte Jahr 1907, wo das Esperanto selbst auf sein 20 jähriges Bestehen zurückblicken konnte, fällt die Gründung der "Asocio Strasburga de Esperanto". Herr Edouard Müller, ein Kind altelsässischer Abstammung, lernte im Jahre 1902 erstmals in einem Almanach der Pariser Firma Hachette Esperanto kennen. Sein weitblickender Geist hatte gleich die hohe Bedeutung -er befand sich damals in Kiel- des Welthilfs-sprachenproblems erfasst. Unermüdlich war von da ab sein Ziel, "die Verbreitung des Esperanto". In der Folge schrieb er an einen gewissen Professor Charles Méray in Grenoble, der ihm das Jahrbuch "l'Espérantiste" zusandte.

Da Herr Müller die Absicht führete, wieder in seine Vaterstadt Strassburg zurückzukehren, so wählte er als Feld seiner nummehrigen...


...1907 estas grava jaro por la subtenantoj de Esperanto kaj ties pioniroj . Ĝi estas fakte la jaro, dum kiu necesis pruvi, ke Esperanto kapablos rezisti kontraŭ la sovaĝaj atakoj de malamikaj potencoj. Ĝi eliris la batalon venke !

Tiu jaro 2007, dum kiu Esperanto jam retrorigardas al dudekjara ekzisto, estas samtempe la jaro de la fondo de « Asocio Strasburga de Esperanto »

En la jaro 1902, Sinjoro Alfred Muller, infano de longjara alzaca deveno, konatiĝis kun Esperanto por la unua fojo en almanako de la pariza firmao HACHETTE. Lia sagaca spirito tiam komprenis la egan gravecon de la helplingva problemo. Li tiun jaron troviĝis en Kiel. Senlace li sekvis sian celon : la disvatigon de Esperanto. Tial li skribis al iu Profesoro Charles Méray, en Grenoble, kiu sendis al li la Jarlibron « L' espérantiste » Pro tio, ke Sinjoro Muller intencis denove hejmenveturi al sia naskiĝurbo Strasburgo, li elektis tiun urbon por ekagadi...

(el la redaktejo: tradukis E. Ludwig)

Visitez Strasbourg en espéranto - Vizitu Strasburgon esperantlingve



La vizitŝipoj de Strasburgo proponas novan lingvon por la gvidita vizito de la urbo tra la kanaloj : Esperanton. Ĉe la deka kanalo de la sonsistemo, la vizito disponeblas nun nur ĉe la tegmentaj ŝipoj. La sentegmentaj ŝipoj proponos ĝin venontprintempe kiam la sonsistemo estos adaptita.

Les bateaux mouches de Strasbourg proposent désormais une nouvelle langue pour la visite guidée par les canaux de la ville : l'espéranto. Située sur le canal 10 du système audio, la visite en espéranto n'est disponible pour l'instant que sur les bateaux couverts. Les bateaux découverts la proposeront au printemps prochain dès que leur système audio sera modifié.

500 000 vojaĝantoj eniras la boatojn de la *Strasburga Sendependa Haveno* ĉiujare. Pro tio, kaj celante utiligi Esperanton, ni proponis al la Haveno traduki la promenadon tra la urbocentro kaj la eŭropa kvartalo al Esperanto.

La estro de la haveno akceptis la proponon, kaj transdonis la francan tekston al ni. Post adaptiĝo al la internacia publiko kaj traduko, helpitaj de Catherine Roux kaj Ginette Martin, la strasburgaj klubanoj surbendigis ĝin. Ni fine kontrolis longecon de ĉiu sekvenco, kaj dank'al la ĉina versio, kiu estas ofte longa, ni havis sufiĉe da tempo por paroli klare.

Nuntempe, Esperanto aŭskulteblas ĉe tegmentaj boatoj "*Nuée bleue*", "*Belle Strasbourgeoise*", "*Rouget de l'Isle* kaj "*Petite France*". Venontjare, la lasta tegmenta boato "*Gustave Doré*", kaj la sentegmentaj boatoj ricevos ĝin post adaptiĝo de sia sonsistemo.

Esperanto nun fariĝas la deka lingvo aŭskultebla dum la vizito. Antaŭ ĉiu ekiro, la ŝipestro anoncas ĉiujn dek lingvojn per laŭtparolilo. Ĉiuj ĉeestantoj aŭdos la frazon "*Por aŭskulti la ĉiĉeronadon per la internacia lingvo Esperanto, elektu numeron 10*".

Ĉar eble vi ne havos tempon enŝipiĝi, aŭ vi ne ŝatas tiun rimedon por malkovri la urbon, vi povas elŝuti la sondosierojn kaj aŭskulti ilin per via *mp3-ilo*. Vizitu <http://www.esperanto-strasbourg.net> aŭ <http://benecyril.free.fr> .

Klubanoj aldonos poste aliajn dosierojn, kiuj rilatos al la katedralo kaj placoj Kleber kaj Gutenberg.

Nia plano estas nun organizi inaŭguron de tiu nova uzebleco de Esperanto, venigante gravulojn kiel Eŭropaj Parlamentanoj. Ni planas filmi inaŭguran paroladon, aldoni bildojn de la urbo, kaj disvastigi ilin senpage al ĉiuj televidkanaloj en Eŭropo kiuj volos raporti pri la evento.

Cyrille Hurstel
el Esperanto-Strasbourg

63-a Regiona Staĝo


de **esperanto**

ALIGILO

Partoprenu !

KONCERTO DE JOMO
CONCERT DE JOMO

Vigy (Moselle) 2-3-4 majo 2008




*Prelego pri historio de Loreno
Conférence sur l'histoire de la
Lorraine*

Catherine GALLEGO

*Tincjo kiel lernolibro...kaj aliaj
rimedoj por plibonigi siajn
konojn kaj parolkapablojn...
Tintin comme livre d'étude...et
d'autres remèdes et moyens
pour enrichir ses
connaissances et son
expression orale...*

Michel DECHY



**Kiel
alveni?**

Comment arriver ?

Vigy estas facile atingebla :

Vigy est facile à atteindre:

Luxembourg 66 km

Mulhouse 236 km

Nancy 77 km

Strasbourg 150 km

Fervoja stacidomo SNCF en Metz 17 km

Pliaj informoj :

Plus d'informations :

<http://www.esperanto-thionville.ass0.fr/>

<http://www.mairie-vigy.fr/>

<http://train.touristique.canner.la-moselle.com/>

<http://tourisme.mairie-metz.fr/>

<http://www.moselle-tourisme.com/>

<http://www.myspace.com/jomoleclerq>

LIBROSERVO

SERVICE DE LIBRAIRIE

37 rue P. et M. Curie

FR-54500 VANDOEUVRE libroservo.efe@wanadoo.fr



**ESPERANTO
THONVILLE**



esperanto
France-Est

- 08a00-09a00 : mantenmanĝo,
- 09a00-11a30 : kurso A, promenado,
- 12a00-13a00 : tagmanĝo,
- 13a00: libera tempo, digesta promenado,
- 13a00-14a15 : akcepto de la staĝanoj,
- 14a15-18a15 : kursoj A, B, C, D (prelego), infanoj E,
- 16a30-17a00 : paŭzo - libroservo,
- 18a15-19a00 : deklamado de Robert Kueny,
- 19a00 : vespermanĝo,
- 20a30-22a00 : koncerto de "Jomo" en Esperanto kaj aliaj lingvoj.

Dimanĉe 4an de majo 2008

- 08a00-09a00 : mantenmanĝo,
- 09a00-11a30 : kursoj A, B, C, D (prelego), infanoj E,
- 12a00-13a00 : tagmanĝo,
- 13a30 : ekskurso laŭ via deziro per turista trajno de valo « Canner » de Vigy al Hombourg -Budange kaj reiro.

Dimanĉe 4an de majo je la 14a00 : ĝenerala kunveno de la Federacio "Espéranto France Est" - assemblée générale de la Fédération Espéranto France Est.

A por komencantoj / débutants Marcel Redon; B por progresantoj / pratiquants André Grossmann; C konversacio / conversation Michel Déchy; D prelego / conférence Catherine Gallego; E Infanoj / enfants Ginette Martin.

Dimanche 4 mai 2008

- 08h00-09h00: petit déjeuner,
- 09h00-11h30: cours A, B, C, D (conférence), enfants E,
- 12h00-13h00: dîner,
- 13h30: excursion selon votre désir avec le train touristique de la vallée de la Canner de Vigy à Hombourg-Budange et retour.

Aliĝilo (vidu prezojn aliflanke) - Bulletin d'inscription (tarifs au dos)

S-ro/ Mr S-ino / Mme	Familia nomo / Nom	Persona nomo / Prénom	Aliĝkoto/ Cotisation	Vegetarano/ Végétarien	Elektita kurso/ Cours choisis
1 ĉefaliĝanto					
2 kunaliĝanto					
3					
4					

Adreso (Adresse) :

Poŝtkodo (CP) : Urbo (Ville) :

Lando (Pays) : Tel :

Retadreso (courriel) :

Nombro da manĝoj Nombre de repas	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
Tagmanĝo, déjeuner			
Vespermanĝo, dîner			
Tranoktado + matenmanĝo, nuit + petit-déjeuner			

**Mia prefero
Ma
préférence**

Ĉiuj ĉambroj enhavas lavabon sen tualettuko. La duŝejo kaj necesejo estas ĉe la etaĝo.
Toutes les chambres ont un lavabo sans serviette de toilette. Les douches et les toilettes sont à l'étage.

La Informilo 140 – page 7

Unulita ĉambro (nur 2 ĉambroj). Chambre à un lit (seulement 2 chambres).

Ĉambro kun 2, 3 aŭ 4 litoj. Chambres à 2, 3 ou 4 lits.

Se vi interkonsentis kun iu por tranokti en la sama ĉambro bonvolu indiki la nomon en la maldekstra kolumno. Si vous avez convenu de partager votre chambre avec quelqu'un veuillez indiquer son nom dans la colonne de gauche.

Kotizoj	Abonanto al La Informilo	Ne abonanto al La Informilo	Cotisations	Abonné à La Informilo	Non abonné à La Informilo
<input type="checkbox"/> Ĉefaliĝanto	30€00	42€00	<input type="checkbox"/> Adhérent principal	30€00	42€00
<input type="checkbox"/> Kunaliganto	25€00	25€00	<input type="checkbox"/> Co-adhérent	25€00	25€00
<input type="checkbox"/> Mi aliĝas post 15/02/2008	+10€00	+10€00	<input type="checkbox"/> J'adhère après le 15/02/2008	+10€00	+ 10€00
<input type="checkbox"/> Mi aliĝas post 30/04/2008	+15€00	+15€00	<input type="checkbox"/> J'adhère après le 30/04/2008	+15€00	+ 15€00
<input type="checkbox"/> Infano malpli ol 15 jara, studento	1€00	1€00	<input type="checkbox"/> Enfant de moins de 15 ans, étudiant	1€00	1€00
<input type="checkbox"/> Junulo malpli ol 26 jara	15€00	15€00	<input type="checkbox"/> Jeune de moins de 26 ans	15€00	15€00

La aliĝkoto entenas la partoprenon al elektitaj kursoj aŭ prelegoj kaj al la distraj vesperoj. Ĝi ne estas repagebla krom grava kialo. La cotisation comprend la participation aux cours ou conférences choisis et aux soirées récréatives.

Elle n'est pas remboursable sauf cas de force majeure.

Restado	Prezo	Séjour	Prix
<input type="checkbox"/> Plena pensio por 1 persono dum 2 tagoj (2 trankoktoj + 2 mantenmanĝoj + 2 tagmanĝoj + 2 vespermanĝoj).	84€00	<input type="checkbox"/> Pension complète pour 1 personne pour 2 jours (2 nuits + 2 petits déjeuners + 2 déjeuners + 2 dîners).	84€00
<input type="checkbox"/> Plena pensio por 1 persono dum 1 tago (1 tranokto + 1 mantenmanĝo + 1 tagmanĝo + 1 vespermanĝo).	42€00	<input type="checkbox"/> Pension complète pour 1 personne pour 1 journée (1 nuit + 1 petit déjeuner + 1 déjeuner + 1 dîner).	42€00
<input type="checkbox"/> Unu nura trankokto kun mantenmanĝo.	18€00	<input type="checkbox"/> Une seule nuit avec petit déjeuner.	18€00
<input type="checkbox"/> Unu nura tag-aŭ vespermanĝo.	13€40	<input type="checkbox"/> Un seul repas déjeuner ou dîner	13€40
<input type="checkbox"/> Plena pensio por 1 junulo malpli ol 10 jara dum 2 tagoj (2 trankoktoj + 2 mantenmanĝoj + 2 tagmanĝoj + 2 vespermanĝoj).	50€40	<input type="checkbox"/> Pension complète pour 1 enfant de moins de 10 ans pour 2 journées (2 nuits + 2 petits déjeuners + 2 déjeuners + 2 dîners).	50€40
<input type="checkbox"/> Plena pensio por 1 junulo malpli ol 10 jara dum 1 tago (1 tranokto + 1 mantenmanĝo + 1 tagmanĝo + 1 vespermanĝo).	25€20	<input type="checkbox"/> Une seule nuit avec petit déjeuner pour 1 enfant de moins de 10 ans pour 1 journée (1 nuit + 1 petit déjeuner + 1 déjeuner + 1 dîner).	25€20
<input type="checkbox"/> Unu nura trankokto kun mantenmanĝo por 1 junulo malpli 10 jaroj.	10€80	<input type="checkbox"/> Une seule nuit avec petit déjeuner pour 1 enfant de moins de 10 ans.	10€80
<input type="checkbox"/> Unu nura tag-aŭ vespermanĝo por 1 junulo malpli 10 jaroj.	7€70	<input type="checkbox"/> Un repas ou dîner pour 1 enfant de moins de 10 ans.	7€70
Donaco		Don	
SUME		TOTAL	
SUMO ENTUTE (Kotizo + restado) =	€	SOMME TOTALE (Cotisation + séjour) =	€

Bonvolu sendi la aliĝilon kun antaŭpago (minimume la kotizo) al :
Veuillez envoyer le bulletin d'adhésion avec un acompte (au minimum la cotisation) al :

Espéranto-Thionville

c/o Bruno HENRY

8 rue Pasteur

FR-57240 NILVANGE (Francio) Tel.: +33 (0)3 82 53 25

retadreso: esperanto-thionville@laposte.net

Ĉekoj kaj ĝiroj je la nomo de Esperanto - Thionville /
Chèques et virements au nom de Esperanto - Thionville
Internacia ĝiro / Virement international IBAN :

FR76 1027 8051 0000 351 0494 506

BIC : CMCFIFR2A

Ĝis baldaŭ ! (via aliĝo validas nur post ricevo de via pago
- votre adhésion ne sera valide qu'après réception de
votre paiement.

Internacia renkontiĝejo en Loreno

Centre international de séjours en Lorraine



La internacia restadejo "ADEPPA" kiu troviĝas je 15 km de Metz ĉe la lorena vilaĝo Vigy, rando de la arbaroj de Vigy kaj Saint-Hubert, ĝuas bonegan lokon en la koro de la "Lando de la tri limoj kaj Metz-a valo", proksime de landlimoj de Germanio kaj Luksemburgio. La regiono kiu havas riĉan kaj diversan historian heredaĵon, subtenas la verdan, industrian, kulturen kaj militan turismon : muzeoj, "Maginot Linio", termobanejo kaj zoologia parko de Amnéville les Thermes, amuziĝa parko : "Waligator" en Hagondange, turisma trajno de la Vallée de la Canner kaj la 3000 jara urbo Metz !

Vi povos promeni kaj ripozi meze de 13 hektara verda bieno.

Le Centre International de Séjour "ADEPPA", situé à 15 km de Metz, en bordure de Vigy village lorrain, et à la lisière des forêts de Vigy et de Saint-Hubert, bénéficie d'un emplacement privilégié au cœur du "Pays des trois Frontières et du Val Messin" non loin des frontières de l'Allemagne et du Luxembourg. La région, au patrimoine historique riche et varié, favorise le tourisme vert, industriel, culturel et militaire : musées, Ligne Maginot, centre thermal et parc zoologique d'Amnéville les Thermes, parc Waligator à Hagondange, train touristique à vapeur de la Vallée de la Canner et la ville de Metz aux 3000 ans d'histoire !

C'est au milieu de 13 ha de verdure que vous pourrez vous promener ou vous reposer.

Association Adeppa (Centre International de Séjour);
avenue Charlemagne; FR 57640 VIGY (Francio)
Tel.: 03 87 77 92 09

Programo diversa por ĉies intereso

La anoj de Esperanto Thionville preparas por vi tre diversan kaj riĉan programon okaze de tiu internacia amikeca renkontiĝo:

Vendrede 2an de majo 2008

- 17a00 : akcepto de la unuaj alvenantoj, vizito de la domo, la parko kaj libera promenado en la vilaĝo,
- 19a00 : vespermanĝo,
- 20a30: videofilmo pri 92a UK en Jokohamo 2007, Bernard VIVIER,
- 21a30 : bonveno, interkonatiĝo.



Programme varié pour tous

Les membres de l'association Espéranto - Thionville vous préparent un programme riche et varié pour cette rencontre internationale.

Vendredi 2 mai 2008

- 17h00: accueil des premiers participants, visite de la maison, le parc et promenade libre au village,
- 19h00: dîner,
- 20h30: film vidéo sur le 92 ème congrès universel d'Espéranto à Yokohama en 2007, Bernard VIVIER,
- 21h30: bienvenue, soirée "Faisons connaissance...".

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

1-a marto ĝis 8-a marto 2008 Francio – Lazura Marbordo

Se ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso. bonegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro!!!



Vi povos plibonigi vian nivelon de Esperanto partoprenante en kursoj Gvidantoj de kursoj estos

1a kurso : **Josée LAFOSSE**

2a kurso : **Jean-Pierre BOULET**

3a kurso : **Claude PIRON**

Posttagmeze vi mem elektos vian programon :

promenado, piedrado en montaro *Estere!*

(kunportu viajn marŝo-ŝuojn), familia vivo ĝis la vespero, distraĵoj.

La studejo estas komforta hotelo « Le Renouveau » en **AGAY** (ĉe **St-RAPHAËL**) - Francio

Aliĝkoto : **55 €**

Familia aliĝkoto : **100 €**

INFORMOJ KAJ ALIĜILOJ :

Monique PRECIOZO, 92 impasse Jean Moulin
FR 83700 **St-RAPHAËL** ☎ 0033 (0)4 94 83 06 88
prezmoni@hotmail.com

aŭ **Christine GRAISSAGUEL**, Les Iles d'Or, rue du progress
FR 83600 **FREJUS** ☎ 0033 (0)4 94 95 66 18

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ :

**Internacia Esperanto-Konferenco – 2008
en Slovenio, 12-18.07.2008
Sempeter pri Gorici / Šempeter ĉe (Nova) Gorica**

Temo: Fernando DE DIEGO, vivo kaj verkaro

Organizanto: **ORBIS PICTUS**, Viŝnja Brankoviĉ, Via Parini 5, 34129 Trieste, Italio
tel/faks: +39/040 767 875 orbispictus@iol.it

Konstanta adreso: **Eric Laubacher**, kasisito de OSIEK
1, rue de Bougainville, 78180 Montigny-Bx, Francio
tel: +33 1 30 96 67 91 kasisito@osiek.org

**Ĉiutagaj prelegoj sekvataj de debatoj. Libroservo
Suspensa voĉdonado por OSIEK-premio 2008
Bona internacia etoso de negranda aranĝo
Favoraj kondiĉoj kaj prezoj**

inter Ljubljana (100 km) kaj Venecio (160 km)

Apudlima kaj translima evento
en regiono de najbarurbaj Nova Gorica (Slovenio) kaj Gorizia (Italio).

Bonega trafika atingebleco
trajne, buse, ŝipe; flughaveno de Triesto (Italio) distancas ĉ. 30 km.

Proksimeco de maro (Adriatiko, 15 km), montaro (Alpoj), mondfamaj grottoj.

Allogaj proksimaj ekskursceloj. Posttagmezaj ekskursetoj dum la konferenco.


Postkonferencaj ekskursoj (dum tri tagoj) aŭ/kaj
kunvojaĝo al 93a UK en Roterdamo.

Konferencejo kaj loĝejo en: Nova Studenta hejmo:
duopnensio en 2-lita ĉambro: 25 eŭroj
duopnensio en 1-lita ĉambro: 30 eŭroj
duŝejo & necesejo komuna por 2 najbaraj ĉambroj
ebleco de hotelo: petu rekte de Viŝnja Brankoviĉ

VI ESTU BONVENA !

OSIEK-PREMIO 2007

En 2007 la Osiek-anoj proponis 20 verkojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la juna numero de *La Gazeto*. La 20an de julio 2007, dum la IEK en Pazarĝik, Bulgario, sekreta voĉdonado atribuis la premion al **Armela LEQUINT & Jak LE PUL**



Serge SIRE:
Demonstro de gemonstroj, 2007.

pro la esperantigo, el la franca, de romano de CÉLINE (*Voyage au bout de la nuit*)
'Vojaĝo ĝis noktfino'

Gratuloni!

La premio, 600 €, rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verko ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro

Informoj

La Gazeto, 12 sous la Ville, FR-55210 Creusé <http://osiek.org>

Aliĝkotizo (en €)

La Jara Kotizo (JK) al OSIEK estas egalvaloro de 25 poŝmarkoj por enlanda letero. Por OSIEK-anoj, la aliĝkotizo al IEK estas obligo de la JK, kun minimuma kaj maksimuma valoro.

periodo	< 2008-01-30			< 2008-03-30			Poste		
OSIEK-ano	Min	Norm	Maks	Min	Norm	Maks	Min	Norm	Maks
Nemembro	20€	6*JK	60€	25€	7.5*JK	75€	35€	10*JK	100€
				80€				100€	120€

Partatempa partopreno: po 24 € tage

- Rabato 50 %-a por junuloj ĝis 26 jaroj, handikapuloj;
- Rabato 30 %-a por samadresa kunulo de la aliĝinto.

La kotizo inkluzivas: organizajn elspezojn, konferencajn materialojn, partoprenon en la programo, refreŝigaĵojn dum la paŭzoj, minimume unu viziton en la urbo, interkongan bufedon la unuan vesperon. Ĝi inkluzivas nek loĝadon, nek manĝojn. La kotizo estas ne repagebla.

Aliĝilo

- S-ro, S-ino **Familia nomo**
- persona nomo**
- kompleta adreso**
- telefonoj / fakso**
- (reladreso)**

Mi mendas loĝadon por la noktoj: 1 2 3 4 5 6 7 8 en:

- Studenta hejmo (2-ita ĉambro, 1-ita ĉambro; duonpensio: 25/30 eŭroj)

Mi petas informojn pri la loĝado en hotelo, aliaj loĝeblacoj

Mi petas informojn pri:

- la triaga postkonferenca turisma aranĝo
- kunvojaĝo al 93-a UK en Roterdamo
- Mi petas oficialan inviteteron al la konferenco

Mi (antaŭ)pagas por konferenca kotizo:

por loĝado:

por solidareca fonduso:

Entute:

Dato Subskribo

VOJAĜO AL LAPONIO

(far Robert KUENY el GEISHOUSE)

8000 km per trajno, ŝipo, buso... kaj Esperanto !

Mi forlasis mian montar-vilaĝeton en Sud-Alzaco komence de septembro 2007 kaj hejmen-revenis fine de la sama monato. Mi faris mirinde belan vojaĝon al la Nordo, renkontante homojn kaj spektante belegajn pejzaĝojn.

De pluraj jaroj mi revis iri al Laplando, ĉar antaŭ dek jaroj mi aĉetis la libron : « Kie boacoj vagadas », originala verko de la finna esperantistino Eija Salovaara. Kaptita de la priskribo de la beleco de la aŭtunaj laplandaj arbaroj, (*) mi deziris « iam vidi tion », kaj komence de ĉi-jaro 2007 mi decidis iri tien meze de septembro.

Mi havis tiun ŝancon ĉi-jare alveni al Rovaniemi, ĉef-urbo de Laplando, la celo de mia vojaĝo, ĝuste kiam la folioj de la betuloj



Ruska

plej flavis. Kvar tagoj poste, kiam mi forlasis Laplandon ili jam forfalas. Kiaj koloroj ! Mi vidis tion, kion priskribis Eija Salovaara. Mi estis tre kontenta ne maltrafi tiun « eventon » ĉar tio dependas de la klimato dum la jaro.

Mi preparis mian vojaĝon. Survoje mi deziris travivi mian scion de la internacia lingvo por renkonti homojn en la diversaj landoj, kiujn mi trairas. Mi demetis mian dorso-sakon dek-du foje por resti almenaŭ dum du tagoj ĉe miaj gastigantoj.

Unua etapo : trajno al Hamburgo, akceptita ĉe la stacidomo de Sylvia kaj Kai.

Vizito al la urbo. Kai donis al mi bonajn indikojn pri la venontaj etapoj ĉar nun estas ponto inter Danlando kaj Svedio (Tion mi ne sciis kiam mi preparis la vojaĝon) ; do mi alvenis trajne al Malmö (SE)...akceptita de Asta, kiu jam rezervis gastejo ĉambron en la urbo, ĉar la Esperanto-sidejo kaj ties gastejo estis inunditaj de grava pluego dum somero.

Membro de Malmö Esperanto-asocio, Per-Olov vizitigis al mian urbon. Trajne al Stokholmo... akceptita de Soile, responsulino de la sveda asocio ; ŝi estas finn-devena. Ŝi klarigis al mi pri la « milit-infanoj », grava afero dum la dua mondmilito. Ves-



Kristiina




Roberto kaj Sylvia en Tampere

pere mi parolis al la klubanoj de Stokholmo pri miaj du kulturoj (alemana kaj franca).

Nun ŝipo al Finnlando : alveno al Turku...akceptita de Jorma, eminenta esperantisto kiu multe klarigis al mi pri la Historio de sia lando. Gastigo ĉe Mikko, juna sperta esperantisto.

Vizito al la urbo kaj la multaj diversaj insuloj apud Turku, gvidita de Jorma, veturigita de Ainö, ankaŭ esperantisto, emerita kuracisto.



Saŭno



Ferio-domo apud lago

Jen ĉef-urben : Helsinki... akceptita de Kristiina, kies adreso estas en la « Pasporta Servo ». Mi eĉ « antaŭ-gustumis Laponion » en bela kaj bona restoracio. Jen norden al Tampere... akceptita de Sylvia kaj ŝia edzo Veli. La Universala Kongreso okazis en tiu urbo en 1995, en moderna kongres-domo.

Trajne al Kannus (ĉiam norden !)... akceptita de Raita (ŝia Esperanto-kromnomo estas Saliko) kaj ŝia edzo Matti. Ili loĝas en urbeto 60 km.oj de la stacidomo, en la finna arbaro. Saliko, kiun mi ekkonis dum staĝo de Orient-Franca Federacio, afable kaj multe helpis al mi

por prepari la vojaĝon. Ŝi estas mia patrino en Esperantio. Ŝia edzo Matti estas multlingv-parolanto ; li perfekte parolas la francan, kaj aliajn lingvojn... kaj Esperanton.

Norden ! Norden ! Laplando ! Rovaniemi, trajne... akceptita de Pekka (profesoro en loka universitato), vespere kiam jam noktas. Sciu ke agrablas, kiam vi alvenas al urbo kiam noktas kaj pluvas kaj scias, ke vi estas akceptita de samideano kiu svingas verdan flageton ! Tranoktado en komforta



Matti kaj Saliko

gastejo por vojaĝantoj. Estis vendrede, la 21-an de septembro. Venontan tagon, Pekka vizitigis al mi geologian kuriozaĵon. Mi restis tri tagojn en Rovaniemi, mia celo. Dimanĉe : blua ĉielo, brila suno, belaj fotoj ! Dum mia restado ne tro malvarmis : inter 5 kaj 12 gradoj. Post pripensado, hejme, mi opiniis ke mi estus povinta eniri pli norde la misteran, silentan, belegan arbaron de Laponio. Mi reiros tien !

Mi planis ankaŭ viziti Sankt-Peterburgon, sed oni bezonas vizon por eniri Rusion. « Vi diru al S-ro Putin, ke mi estas Mondcivitano ! »

Bedaŭrinde ! Estas ja ses adresoj en « Pasporta Servo » en Sankt-Peterburgo.

Nun Suden, al la hejmo ! Jes, sed sen forgesi viziti Aini (-n) en la orienta parto de Finnlando. Ne ! Neniam preterpasu la domon de Aini, meze de la arbaro, ĉar vi vere estas en Esperantio.

Ŝi... akceptis min ĉe la bus-stacio 30 km-oj for de sia hejmo (finnland-domo de 1830 !). Kia ĝuado ! Refreŝigi sin ekstere post saŭnado , kiam la plen-plena luno leviĝas inter la pintoj de la pinarboj ! Jes, mi ĝuis Finnlandon !

Nun reveno per trajno al Helsinki, antaŭ enŝipiĝo por atingi Nord-Germanion... akceptita de Anna-Liisa ĉe la stacidomo.

Vi do bone komprenis ke mi, dum preskaŭ unu monato, estis ĉiu-foje... akceptita de samideanoj. Mi asertas ke dum la tuta vojaĝo mi parolis la internacian... tute klare.

Tion mi deziris ; tion mi spertis !

« Kiitos » (Dankon) al ĉiuj, karaj amikoj en Esperantio.

Pekka diris : « Vi alvenas, ni interparolas....sen probleme, ĉu ne fantaste ? »

ROBERTO



Norda Migrado



Foto de Aini kun granda litero E

* Mi ja deklamis ĉapitron de la libro dum staĝo de la federacio, iam ie ajn en la Vogezoj, tiam mi enamiĝis en tiuj « ruska » kolo-roj. (« ruska » estas la finnlanda nomo de la « oriĝo » de la aŭtuna arbaro).

Anekdoto : kiam mi elŝipiĝis en Rostock (Nord-Germanio) apud mi marŝis junulino kun granda dorso-sako. Ŝi parolis la germanan; mi scipovas la germanan. (Mi ne plu estis en Esperantio !). Ni interdiskutis iom, inter vagantoj ! « Jes, mi venas ankaŭ el Laplando, sed mi vojaĝis nur per la angla... ne per KIO ? Esperanto ? Kio estas tio ? Ĉu ne estas ia grupiĝo ? Ne, ne, neniam (!), nur per la angla » (!)

« Adiaŭ, Fraŭlino »

Ni pensu pri tiuj gejunuloj kiuj trairis la tutan mondon senpage, per la « Pasporta Servo ».

ROBERTO




Ruska

... Jes, indas viziti gastigeman Uzbekion ! ...

Post nia multfacete riĉa semajno ĉe la Azov-Maró *** dum la jara renkontiĝo RET-07, jen ni denove en Moskvo por flugi al Taŝkento, unua halto sur nia propra "silka vojo". Ni ja ekscitiĝas antaŭelvokante la trian etapon de nia somera vagabondado.


Alteriĝo sub la kutima varmo -38°- sub la same blua, sennuba ĉielo. Ni paciencie vestumas en svarmo da vojaĝantoj "diverskoloraj" kaj iom post iom ni alproksimiĝas je la specifa kontrolĝiceto. Sed strange mienas la oficisto okulumante al niaj pasportoj... " *Tuentisiks, ne fajv !* " Katastrofo ! Nia vizo validos nur ek de morgaŭ !



Teknika incidento dum ties ellaboro anticipigis je ses horoj la eniron de la lando ! Sekvos anonco de deviga transit-periodo, kiun ni "ĝuos" ĝis noktomezo, momento de nia oficiala liberigo ! ... Kaj dume nia amiko Eùgeno, tiom helpema kiel antaŭ... deksep jaroj, vane atendas nin ekstere, pensante, ke ni mistrafis aviadilon... Baldaŭ ni solos en la silenta fak-ĉambro kaj ekvidos tra fenestro niajn valizojn glitante regule, plurfoje, sur la specifa moviĝanta tapiŝo !



Nu, mi rapide menciu nian duonnoktan restadon en la luksa "transit-salono", kien komforta buso veturigis nin, nian konatiĝon kun familio el Israelo, ankaŭ en deviga transito, familio kiun ni "fulme esperantigis"... Finfine, je noktomezo, post folkloro klopodado por reakiri la valizojn, jen nia Eùgen, kiu, duan fojon, sukcesis trafi nin, kaj veturigos nin taksie ĝis sia hejmo. Koran dankon al li, kiu sindoneme kaj pli ol "samideane" gastigos nin dum du tagoj. Ni malkovros kaj enpartoprenos kun li tipan



matenmanĝon, kazeon, teon, lokan panon... kaj ĉiutemajn babiladojn !

Malkovro de Taŝkento, sub la gvidado de juna, vere helpema, porokaze ĉiĉeronino... kutima nomo "Muguet" (konvalo), studentino, kiu tiatempe



ankaŭ gastas ĉe Eùgen. Ŝi daŭre, akurate, sindoneme, vere koramike, vizitigos al ni la grandan urbon. Ni uzos la tutmodernan metroon (malpermesate foti ! ?), la plenplenan buson... kaj esence la piediradon por trairi la okulfrapaj placojn ! Jen la skvaro *Amur Timur* kun giganta statuo de *Tamerlan* sur ĉevalo, la miriga "Placo de la Sendependeco" kun fontanludoj, la parko *Navoi*, la impona fasado de la *Senatejo*, la *Madrasa Abdoul Kassim*... Neatendita spektaklo : surŝosea ekspozicio de lokaj pentristoj en la kvartalo "Broadway" ! Fakte ni profitis tro fulman promenadon, sed tamen mi ne forgesu ankaŭ mencii la

tipajn restoraciojn, kie ni frandiĝis kun "Konvalo" specialaĵojn tipe uzbekajn. Forflugas la tempo... Post rapida "adiaŭ !" -mankos bedaŭrinde nia Eùgen- jen ni en la moderna trajno "Ŝark", cele atingon de Samarkando. Ni surprize vojaĝos kun televid-ekrano alkroĉita ĉe la fronta dosiero ! Tiujn sidlokojn rezervigis al ni alia magiisto, Anatoli. Ni traveturas kamparon, kie alternas sekaj ebenaĵoj kaj tutsame nudaj montetoj...

Samarkando ! Jen Anatoli sur la kajo... Bonvenigon, varma akcepto... Li ne ŝanĝiĝis kaj daŭre junas kiel antaŭ deksep jaroj !

La de li ellaborita programo tiom riĉis, ke kvar pluaj paĝoj de nia bulteno ne sufiĉus par raportoj ! Kortuŝis nin la vespera festeno preparita de lia ĉarma edzino, memorinda "varma" momento, kiun ankaŭ enpartoprenis la granda filo...




Anatoli trafis elektis por ni simplan hotelon, kie la komplezema hotelresponsulo kaj lia patrino, klopodis oferti al ni gastaman etoson.

Disvolviĝos dum unu semajno neelĉerpeblaj vizitsekvencoj! Elstaras akcepto far la Direktoro de la ŝtata muzeo pri Historio kaj Kulturo... Dankon koran al Sinjoro Numon Mahmudov, kiu parte iĝis ĉiĉerono dum la vizito.



Kaj sin sekvos malkovro de la riĉaĵoj, eksteraj aŭ enaj, kiuj famigas tutmonde la urbon... Okultrafa *Ensemblo Registan*, najbaraj *Madrasoj*, *Maŭzoleo Gur-Emir*, en kies kriptoj ripozas *Tamerlan*... Nia daŭre helpema ŝoforo *Ilhom* veturigos nin ĝis la observatorio *Ulugbek*.

Nu, ni provizore forlasu la urbon por atingi *Buĥara* post 300 km-oj da ŝoseo, kiun ne tro ŝatas la lokaj aŭtomobilistoj... Varmo, polvo, poluado, traveturo de urbetoj, kie necesas montri la stirpermesilon... Pli ol interesiga halto ĉe unu el la historiaj "*caravan-seraĵoj*" *Rabat-Malik*. Fine jen la ankaŭ fama, antikva urbo, registrita kiel *Monda Heredaĵo* far UNESKO.



Denove fulma piedirado tra la larĝaj, foje mallarĝaj stratojn por atingi la imponan, gigantan fortikaĵon *Ark*, kiun ni "surgrimpos"! Tro rapidaj okulumoj al la diversaj *Madrasoj*... Ni bedaŭrinde kapablos nur foti multajn el tiuj vidindaĵoj.

Nia posta veturado al la antikva *Shahrisabz*, naskiĝloko de Amir Temur iĝos certe la kulmina punkto de nia vizit-programo, daŭre polurita de nia amiko Anatoli. Ĉe la stirilo, nia kutima ŝoforo *Ilhom*, kiu, en monto-ĉeno, lerte englutas la kurvojn de landstratoj, kies ŝoseoj ne ankoraŭ konas bitumon!

Urba festotago! Nenombreblaj lokaj aŭ regionaj gastoj invadas stratojn kaj parkojn! Ni eĉ kaptos bildon de iu grupo da invititoj al geedziĝofesto, kiu pozas piede de la giganta statuo de *Amir Temur*. Malkovro de la plej okultrafaj konstruaĵoj kaj restaŭritaj "restaĵoj".

Nu, ni rapidu por atingi *Urgut*, 50 km-ojn for, kie ni enmemorigos sekvencon de tipa tagmanĝo, abunda, festpreparita de la edzino de loka, famkonata potisto. Ni sidos "jogi-maniere" ĉirkaŭ malalta tablo en ombrita korto.



En urboparko, parte por infanoj, "totemo" sur kio oni legas "*Paco sur la Tero*". Al Anatoli ni ŝuldas tiun simblan maston. Mi ne preterlasu aludon al alia parko, kie kreskas miljaraj platanaj... Oni eĉ malfermos por ni pordon, kiu ebligas eniri "ĉambbron" kavigitan en iu giganta arbo-trunko!

Ve! Baldaŭ finiĝos nia turisma semajno... Lasta vespermanĝo kun lokaj esperantistoj kaj... rusa poetino! Ni kunkantos en Esperanto.

Duan de septembro, lastaj vizitoj. *Muzeo de fondiĝo de Samarkando*, *arkeologiaj elfosaĵoj*, originala vizito de *meti-artejo*, kie ni ĝuos muzikan prezentadon de mirindaj virinvestaĵoj surmetitaj de -vivantaj- manekenoj!

Valizoj, stacidomo, emocia brakumado... Anatoli atendas la foriron de la trajno ĝis la lasta minuto...

Vespere, en Taŝkento, denove dank' al li, komforta hotelo. La morgaŭon, frumatene, ni ekflugos ĝis Moskvo...

Daŭre ekscititaj, ni ofte retrovivis nian uzbekan aventuron. Restos definitive memorigitaj "vido-bendoj"... kaj, konkrete, pli ol dumil fotoj!

Dankon, dankon al la tuta teamo da helpemaj homoj, kiuj sukcesigis nian entreprenon! Ili ne nur "ĉiĉeronis" sed rapide iĝis veraj amikoj! Ĝis revido!...

*** (raporto en "*La Informilo*" 139)

PS – Ĉu utilas aldoni, ke dum niaj multnombraj travivaĵoj, la ĉefa uzita komunikilo estis esperanto.

Punkte ni uzis la francan kun "Konvalo", kaj kun du junaj, profesiaj gvidistoj, en Samarkando kaj Buĥara... Tiuj du lastaj perfekte regis nian lingvon kaj sincere surpriziĝis konstatante sian ne-informon pri la internacia lingvo!

Angla idiomo ĉie parolata?... Lasu nin ridi! Krom cento da vortoj uzataj de ĉiuj butikistoj, fakte nur mizera "sub-globish", neniu trafita surstrata homo intervjuita sukcesis ŝoviĝi en iun ajn etan konversacion... Ni provis kun taksi-ŝoforo de granda moskva firmao, sed la afero rapide fiaskis!

LA 40-A ILEI-KONFERENCO

La 11-19ajn de aŭgusto, 2007
Ranzan, Japanio

„Virinoj en Esperanto-kulturo“



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) organizis sian kongreson en Japanio en la urbo Ranzan, kun la nomo ILEI-konferenco. Ĝi okazis de la 11a ĝis la 19a de aŭgusto, en la semajno tuj post la Jokohama kongreso. Tiel ĝi povis estis ankaŭ la post-kongreso por pluraj kongresanoj. Tute oportune estis organizita aŭtobusa veturado de Jokohamo al Ranzan. Ĝi estis plenplena, tial iuj japanoj eĉ pretis tien veturi trajne.

En Ranzan ĉiuj partoprentoj loĝis en komforta "Por-virina kulturcentro", tial la temo de la semajno rilatis al virinoj kaj estis "Virinoj en Esperanto-literaturo". La centro estis preskaŭ tute laŭ okcidenta stilo, kun apartaj komfortaj ĉambroj. Tamen la manĝoj estis plej ofte japan-stilaj. Bedaŭrinde en la manĝejo la klimatizilo tro malvarmigis la ejon. La partoprenantaro estis plejparte eŭrop-devenaj.

En la programo estis planita Seminario kun diversaj prelegoj pri Esperanto-verkistinoj. Tiu programero estis aparte interesa, ĉar ĉeestis la konferencon Spomenka Ŝtimatec kaj Anna Lowenstein. Ili prelegis respektive pri *Virinoj en Esperanto-kulturo* kaj pri *Virina agado en la Esperanto-movado*.

Marie-France Conte Rey prelegis pri la revuo "FEMINA". Zsofia Korody raportis pri la agado en la Interkultura Centro Herzberg en Germanio, kie ŝi daŭre deĵoras.

Ni eksciis pri "Verda Majo", kiu fuĝis de Japanio kaj aktivis politike en Ĉinio kontraŭ la japana agres-milito. Alia grava temo estis "Sekso kaj genro en Esperanto".

En la vesperoj okazis distraj aranĝoj kaj bankedo en tipa restoracio. Aparte ŝatataj estis la kantoj kaj muzikoj de Julián Hernández Angulo el Kubo, kiu kantis per tre klara kaj komprenebla voĉo.



Yasuo Hori



Julián Hernández




Bankedo



Dum la lingva Festivalo eblis ekscii pri kelkaj lingvoj de la konferencanoj. Tamen ĉar iuj kursoj okazis samtempe, necesis elekti iujn lingvojn kaj rezigni pri aliaj

Partoprenantoj el Nepalo klarigis pri sia lingvo kaj specifa alfabeto. En la hispana kurso, ni lernis kantojn kaj ties tradukon al Esperanto. Jen "La Kukaraĉa".



Pri Japanio kaj ties kulturo estis proponita kelkaj kursoj. Kimie Markarian lerte instruis la uzadon de Sorabano kaj invitis gejunulojn ege spertajn en mensa kalkulado dank'al uzado de sorobano kaj ties mensa bildigo. Ili fulmrapide adicias plurajn 4-ciferajn nombrojn.

Ikebana estas la arto aranĝi florojn laŭ ia stilo. Plej multaj el la konferencanoj volonte akceptis tiun kurson kaj klopodis krei artaĵojn.



Jen pluraj partoprenantoj klopodis realigi belan ikebana-aranĝon. Aliaj tre elegantas en tradicia kimono.

Jen plia sperto por pluraj eŭropanoj sin vesti per japana kimono, ĉefe por virinoj sed ankaŭ por viroj. Eĉ inter japaninoj, ne ĉiuj lertas por sin sola vesti per kimono, tial ekzistas fakaj lernejoj.

La te-ceremonio estas alia japana tradicio kaj vivo-stilo. Ĝin povis partopreni nur kelkaj el la konferencanoj.

Origami estas la arto faldi paperojn por fari diversajn figurojn. La plej ofta figuro estas gruo. Necesas pacienco por la lernantoj kaj la instruisto.

Ekskursoj estis proponitaj al la ŝintoisma templo Nikko. Ĝi estas konata kiel unu el plej famaj vidindaj lokoj en Japanio.



Zsófia Korody prezentis la lokon de la sekvonta konferenco. La 41a ILEI-konferenco okazos en 2008 en Porto Novo en Benino. Tiam unuafoje en Afriko. Tutcerte la ejo ne ĝuos saman komforton kiel en Ranzan.

Dum la tute semajno regis tre simpatia kaj internacia etoso. Dankon al la organizantoj.

LA 15-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO EN TOSSA DE MAR


De la 29-a de septembro ĝis la 6-a de oktobro okazis en Hispanio la 15-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. La aranĝo okazadas regule aŭtune en hotelo, kie oni ankaŭ manĝas kaj dormas. Ĉi-foje la kataluna urbeto Tossa de Mar allogis pli ol 100 partoprenantojn el 10 landoj. La pitoreskan urbon, kun tre belaj montaraj kaj maraj pejzaĝoj, dominas kastelo ĉe la roka marbordo. Vasta strando invitas al sunumado dum agrabla aŭtuna vetero. Tiele oni plilongigas someron kiu ĉi-jare, en multaj lokoj, ne estis tre sunoplena.

La inaŭguron ĉeestis kaj bonvenigis nin la konsilanto pri kulturo, instruo kaj festoj de la urbo, s-ro Josep Colomer. Dum la du interkonaj



vesperoj ni estis regalitaj per ŝaŭmvino kaj frandaĵoj. Ĉiutage okazis Esperanto-kurso kiun sprite gvidis, laŭ sia propra metodo, s-ano Miguel Gutiérrez Adúriz. S-ano A. Marco Botella prelegis pri “Eŭropo en perspektivo”. Li ankaŭ estis honorita per la premio “Ada Sikorska-Fighiera” pro siaj meritoj rilate al Esperanto. D-ro Árpád Máthé el Budapeŝto prelegis kaj prezentis la laboron de Rondo “Takáč” omaĝe al s-anoj Luis Hernández Izal kaj Ramón Molera. Komunikada ekologio estis temo por debato kun s-ano Wolfgang Gunther.

Kun Luis Serrano Pérez oni debatis pri UEA laŭ 6 proponitaj demandoj. Dum urba promeno ni vizitis lokan muzeon kaj muzeon de la lumturo ĉe la supro de la kastelo. Por transdono de memortabulo pri la evento kelkaj ĉeestis akcepton en la urbodomo kaj tostis kun la urbestro, s-ino Imma Colom i Canal, per ŝaŭmvino.



La tuttaga ekskurso gvidis nin al la plej amplexa fortreso en Eŭropo - “Sant Ferràn”, kiu troviĝas



proksime al la franca landlimo. En Besalú ni rimarkis antikvan ponton kaj ĉe la lago “Banyoles” ni tagmanĝis. Poste, en proksima loko “Aiguamolls”, ni spektis en aŭditorio projekciadon pri birdoj, iliaj voĉoj kun komentario de Yves Eeckhout el Belgio. Restis tempo por promeni en la naturo kaj vidi aŭ aŭdi kelkajn birdojn en diversaj bird-observejoj. Dum ŝipekskurso ni laŭiris la rokojn kaj eniris



kelkajn grotajn. La travidebla fundo de la ŝipo ebligis observi fiŝojn kaj aliajn marbestojn. Dum la tria ekskurso ni vizitis preĝejon en antikva urbeto “Castelló d’Ampuries” kaj bus-promenis inter kanaloj en “Ampuriabrava”.

Vesperaj programoj koncernis kulturon. Ni spektis filmojn kaj operon sur vidbendoj. Certe neforgesebla estis la lasta folkloro vespero kun “Grupo Habaneras Montjuich” kiu gajigis kaj regalis nin per sentimentalaj kantoj. Dume oni pretigis por ni bongustan specialaĵon “Cremat”. Temas pri spicita



kaj bruligita rumo, kiu instigas bonhumoron kaj dancemon. Dum la semajno funkciis libroservo, estis tempo por interbabilado, promenoj en la urbo kaj ĝuado de ties proksima plaĝo kaj maro. Ni devas danki al sinjoroj Luis Serrano Pérez, Salvador Aragaj Galbanj kaj Santiago Tornè Grau, kiuj jam la 15-an fojon prizorgis por ni agrablan ĝuoplenan semajnon.

Liba GABALDA

Gazetara komunikilo

Sophia-Antipolis, la 12an de oktobro 2007



"Ipernity" en Esperanto

... pri "ipernity" ...

- "*ipernity*" estas la unua servo, kiu ebligas al vi kunhavigi ĉion en *Interreto*: blogo + fotoj + filmoj + sonaĵoj + ĉiaj specoj de ciferecaj dokumentoj estas nun kunigitaj en unu sola spaco kaj publikigitaj laŭvole.

- "*ipernity*" adresas sin ne nur al familioj kaj amikaj grupoj por privata uzo, sed ankaŭ al kreantoj por la disvastigo de siaj verkoj al pli granda publiko.

- "*ipernity*" (= *ip* + *eternity*, *ip* + *eterneco*) ebligas la daŭran uzadon de siaj servoj, kaj tiel al ĉiuj aranĝi kaj viviĝi tion, kion morgaŭ oni nomos la cifereca memoro.

- "*ipernity*" kompreneble estas pli ol retejo, kie oni povas kunhavigi siajn dokumentojn. Ĉi krome instigas interagadon inter la aŭtoroj de la publikigitaj dokumentoj kaj inter tiuj, kiuj ilin malkovras kaj uzas. Sistema de prizondado, kontaktoj, grupoj, retbabilado, interna retroŝto, ĉio tio kunlaboras al la ekesto de sociaj grupoj.

La servo estas senkosta kaj **havebla en Esperanto** kaj en 5 aliaj lingvoj. Kroma opcia pagenda servo, la "PRO"-oferto, ebligas pli intensan uzon kaj aliron al pli ekskluzivaj funkcioj.

- "*ipernity*" estas iniciato lanĉita en aprilo 2007 de du francaj interret-pioniroj, kiuj estis ĉe la bazo de servoj kiel *Voila.fr*, *Estat.com* aŭ ankoraŭ *Repubblica*. La asocio havas sian bazon en *Sophia-Antipolis*, la franca '*Silicon Valley*'.

- "*ipernity*" proponas sintezon de ĉio bona rilate al plurmedia publikigado, al laŭdezira kunhavigo kaj al sociaj retoj en *Interreto*. "*ipernity*", tio estas ĉio-en-unu de la *Reto 2.0* !

Vidu: [http://www."ipernity".com](http://www.)

Kontakto por la gazetaro:

Christian CONTI

retadreso: christian.conti@ipernity.com

telefono: +33 6 70 94 71 91

... Memorindas la 62^a kultura semajnfino de Esperanto France-Ĝst !...

Inter 60 kaj 70 personoj aliĝis al la staĝo de Saâles, kies ĉefaj trajtoj estis la perfekta organizo, la nekredebla riĉeco de la programo, la bona partopreno de fremduloj (kvarono de la ĉeestantaro), la komforto de la lokoj kaj la tre bona etoso dum la tri tagoj.

Ankaŭ frapis min la alta nivelo en Esperanto de la partoprenantoj, ĉar neniu persono enskribiĝis por la unuagrada kurso, por la duagrada kurso kun Violette estis deko, kaj ĉiuj aliaj kapablis ĉeesti prelegojn, argumenti pri la temoj, starigi demandojn kaj bone profiti la diversajn surlokajn vizitojn, des pli ke kelfoje ni havis la francajn eksplikojn, kiujn esperantisto tradukis, sed kelfoje nur la esperantan paroladon.

Dum tri tagoj, ni povis...

...Vendrede:

- promenadi en la vilaĝo.
- ludi teame kaj rivali por trovi nomojn, kiuj komenciĝas per lotita litero (kiam ni ne trovis ideon, ni inventis spritaĵon aŭ stultajon por ridigi la aliajn).
- esplori la libro-servon kaj aĉeti librojn.
- rigardi esperantajn filmojn sur televido en la sama salono.

... Sabate:

- aŭskulti prelegon de Cyrille pri la mezepokaj kasteloj, riĉigita de dokumentoj sur ekrano.
- profiti la venon de la urbestro, kiu fieris rakonti, ke lia malgranda urbo

(850 loĝantoj) estas ekologia urbo, kaj poste ni povis profiti la honor-vinon, kiu fakte estis „esperantista vino” de *Edenkoben*.

- viziti la ekologian hejtado-sistemon de de la komunumo, kun la eksplikoj de la zorganto.
- aŭskulti prelegon de *Bruno* pri ĉiuj daŭrigeblaj energioj en Alzaco, denove kun multaj dokumentoj sur ekrano.
- aŭskulti malgrandan prelegon de loka spertulino pri la vogeza dialekto.
- gustumi lokajn produktojn: mielo, spico-kuko, miel-vino !
- admiri la belan ekspozicion de sovaĝajn floroj, kiun *Paul Linus* metis sur breton kun surpaperaj nomoj de ĉiu floro en franca, germana, latina kaj esperanta lingvoj.

metis sur breton kun surpaperaj nomoj de ĉiu floro en franca, germana, latina kaj esperanta lingvoj.

- viziti piede la frukto-padon de la vilaĝo, gviditaj de pasiita spertulo, tiom interesa ke ni forgesis la siberian temperaturon. Ni revenis kun violaj nazoj sed kun la pulmoj plenaj je freŝa viviga aero. Mi notas ĉi-tie la tre kompetentan tradukon de *Jean-Pierre Boulet* dum la tuta vizito.

- kiuj ne iris al tiu pado povis viziti memonitojn (protestanta komunumo, kiu vivas sendependa kun apartaj viv-reguloj)**

- aŭ viziti la lokan bierfarejon.

- post la vespermanĝo, aŭskulti ĉe la protestanta preĝejo de la vilaĝo



eksterordinare bonan koncerton de *Laurence* kun amikoj (zigana muziko) kaj de la paro „*duobla unu*”, tre talenta kaj jam bone konata en Esperantio.

- ĉar la spektaklo daŭris 3 horojn, mi poste iris en la liton, sed kiu volis povis ankoraŭ babilu kaj spekti filmojn.

... Dimanĉe:

- viziti la mirindan mezepokan kastelon de Haut-Koenigsbourg. La fakto ke ne estis tro nombraj aliaj grupoj, ke la radioj de la matena suno beligis la rozajn ŝtonojn de la kastelo kaj la pejzaĝon vaste etendiĝantan sube, la interesaj klaraj eksplikoj de *Cyrille*, ĉio kuniĝis por igi la viziton aparte agrabla kaj magia.



- post-tagmeze ni povis elekti viziton al la memor-muzeo de *Schirmeck* aŭ viziti la muzeon de la pastro *Oberlin*, aŭ resti ĉe la gastejo por ĉeesti la kurson de sorobano***, kiun gvidis la ĉarma japan-devena *Kimie Makarian*.

Ĉar mi elektis la viziton ĉe la muzeo Oberlin, mi povis konstati, ke tiu protestanta pastro, kiu havis edzinon kaj 7 gefilojn, estis en la 18a jarcento avangarda pedagogo, kiu edukis la geknabojn de la vilaĝo per intereso al konkretaj objektoj, kiujn ili povis rigardi, flari, palpi, ktp., ankaŭ fabrikis diversajn reliefajn aŭ eltonditajn metalajn matricojn por kopii florojn aŭ geografiajn mapojn, montris al infanoj multajn sciencajn eksperimentojn, ankaŭ uzis pra-projekciilon por montri bildojn sur ekranu. Lia granda deziro estis fari la geknabojn kleraj sed ankaŭ raciaj, logikaj kaj penso-povaj.

Mi finos mian raporton per du surprizoj. La sabata grandega kuko por la



naskiĝ-tago de *Gilbert Stambach***** elvokis la esperanto-flagon kaj kunportis plie la bildon de Zamenhof, farita per mistera metodo, kiu metis la koloran desegnon sur manĝeblan maldikan tavolon de mi ne scias kiun materialon. Kvankam oni povis manĝi ankaŭ la bildon, neniuj volis manĝi la vizaĝon de nia kara Zamĉjo, kaj li restis ne tuŝita kiel la fundamento !

Kaj dimanĉe, nova giganta kuko aldoniĝis por la 100 jariĝo de la strasburga esperanta klubo.

Ankaŭ ĵurnalisto venis kaj intervjuis kelkajn el ni. Ĉiu el ni ankaŭ ricevis belan sakon plena je valoraj dokumentoj turismaj kaj ekologio-fakaj.

Nenio mankis kaj ni devas varme danki al la grupo de Strasburgo.

PS = ** kaj *** ... raportas najbare *Simone Cajelot* - **** freŝelektita prezidanto de *Esperanto France-Est*.

Ginette MARTIN

...ĉe la Menonitoj ...



Dum kelkaj vizitadis la frukto-padon, aliaj ekkonatiĝis kun la Menonitoj, kiuj loĝas en farndomo ĉe najbara vilaĝo***. Post propono de mirtel-torto kaj diversaj trinkaĵoj, ili klarigis sian religion. Venintaj el Svislando, tiuj protestantoj setlis tie en la 17a jarcento. Izolitaj pro la fermita valo, kie ili loĝis, izolitaj pro la metioj (dum periodo ili estis vitro-fabrikantoj kaj arb-hakistoj, sed ili ĉefe estis farmistoj), ili ankaŭ estis izolitaj pro la aparta religio. Sed ili same evoluis en agrikulturo kaj vivmaniero kiel la aliaj lokanoj. Nova branĉo kreiĝis: la Amiŝoj, kiuj ne tro ŝatis la tro rapidan evoluon kaj migris al Usono.

Ĉefaj punktoj de ilia religio: La bapto estas deziro de la plenkreska persono (ili ne baptas bebojn). Ili rifuzas uzi armilojn, sed akceptas helpi al la nacio (civila deĵorado). Neniu pastro. Matura saĝulo, elektita de la grupo, kondukas kulton (ĉefe legadon de la Biblio). Post la kulto, ili tradicie manĝis kune. Preĝejeton ili konstruis mem,

proksimume en 1950. Ili vivis tutnature sen luksaj objektoj, eĉ butonojn ili ne metis sur vestojn (butono estas lukso), sed nun nenio distingas ilin de la aliuloj. Aktuale restas tie 3 familioj de menonitoj en farndomoj. En Francio, ĉefe orienta Francio, ili estas 2000.

*** La grupeto de domoj nomiĝas "Le Hang", kuŝas ĉe la piedo de la monto "Climont", kaj estas parto de la komunumo Bourg-Bruche.
(G. Martin)



Dimanĉe post-tagmeze, ni studis sorobanon: simpla, rapidega tradicia japana kalkulilo. Pro invento de elektronikaj kalkuliloj, tiu uzo iom perdiĝis, tamen la sorobano same efikas sen pli da eraroj. Kimie Markarian estis profesie konto-tenisto kaj laboris nur tiamaniere. Dua kalkulistino faris la samajn kalkulojn. Kiam la du sorobanoj donis la saman rezulton, la rezulto estis enskribita. Se la rezultoj malsamis (tre malofte) ili rekomencis kalkuli. Per nur sesdeko da globetoj, kiun oni glitigas sur tigojn, oni povas kalkuli miliardojn. Kimie instruis nin kiel adicii kaj subtrahi. Sed oni povas ankaŭ multipliki kaj dividi. Sen timo pri paneo, solida, eĉ luda. Provu ĝin!

Simone CAJELOT



...fruktodona ekskurso ...



La 4an de novembro, la klubo de Nancy organizis turisman tagon en Pont-à-Mousson. Dektri partoprenantoj el Belgio kaj Francio vizitis matene la muzeon "historio de la paperuzado" kaj posttagmeze "Abbaye des Prémontrés" (monaĥejo).


La muzeo malfermiĝis speciale por nia grupo kaj la akcepto estis tre varma. Oni malkovris objektojn, eĉ mem meblojn (ekz. salonon de la angla reĝino Victoria...) el "paper-maĉaĵo" (muldokartono). Ofte la ornamaĵoj estas inspiritaj el la orientalismo. Filmeto prezentis unue la familion ADT, kiu kreis la fabrikan kaj due la industrian progreson en la urbo dum la XIXa kaj XXa jarcentoj. Ni vidis ankaŭ popolan bildaron el Pont-à-Mousson, kiu similas kaj rivalas kun la urbo Epinal.

Post agrabla manĝo ni iris al la abatejo, kie samtempe okazis vingustumado. Tie, tipe ronda kaj ovala ŝtuparo kun mirindaj balustradoj kondukis nin al la supraj etaĝoj.

La tago finiĝis per suprenirado de la monteto "Mousson" -382 m !-, el kie ni admiris la belan pejzaĝon.

Lilane Bersweiler

... "Pac-premio 2008" ?...



Intervjuoj kaj pozitivaj publikaĵoj aperintaj rete, en la gazetaro, en radioelsendoj kaj televidaj - post la okazo de la gazetara konferenco en CDELI kun la du svisaj parlamentaninoj - estas utiligeblaj por argumentado, reagoj:

<http://www.youtube.com/EsperantoTv>

ties filmo pri la kandidatigo de UEA por Nobel-pacpremio fare de svisaj parlamentaninoj:
"Le prix Nobel de la paix 2008 pour l'Espéranto (UEA)"

<http://fr.youtube.com/watc?v=aNLTPKDnjTU>

La retpaĝo de la komunikado de *Svisa Esperanto-Societo*

http://www.kontakto.info/Svisaj_parlamentanoj_proponas_Nobel_Pacpremiom_por_Universala_Esp_eranto-Asocio_UEA.html

Mallonge:

<http://minilien.fr/a0k7cd>

Jam havas ligojn al du radioelsendoj (komence de la paĝo).

El tiu paĝo eblos baldau trovi ligon al la resumo de ĉiu aperinta amaskomunikila publikaĵo rilate al la propono Nobel-Pacpremio/UEA.



Bédéciné en Illzach kaj 100-jariĝo de Tinĉjo

Jam de pluraj jaroj okazas en la kulturdomo Espace 110 en Illzach Festivalo pri bildrakontoj, nomata Bédéciné. Ĉi-jare la 23a Festivalo okazis la 10an kaj 11an de novembro 2007 kun aparta emfazo pri la 100-jariĝo de la aŭtoro de Tinĉjo. La asocio Mulhouse-Espéranto, laŭ la instigo de Simone Kiry, ankaŭ havis sian tablon por prezenti bild-rakontojn en Esperanto.



Sam-okaze ni informis pri la lingvo kaj disdonis multajn kalendaretojn 2008.

Ni proponis al la publiko akiri Esperanto-bild-rakontojn.

Iuj kolektantoj aktive esploris la eblecon akiri la librojn de Tinĉjo en Esperanto. Tial ni sukcesis forvendis nian tutan stokon. "Gastono" kaj "Eta Spiru" ne havis tian sukceson.

La KD "Lernu", la DVD "Esperanto-Elektronike" ankaŭ sukcesis kapti iuj akirantojn.



Ungersheim: Commerce équitable



La 14an kaj 15an de novembro 2007 okazis en Ungersheim vilaĝo norde de Mulhouse, foiro pri "Justa Komercado" (Commerce équitable), ĉi-jare nomata "Consom'acteur" (aktiva konsumanto).

Same kiel en 2006, nia asocio Mulhouse-Espéranto havis je dispono tablon por prezenti la internacian lingvon Esperanto.

Libroj, revuoj, prospektoj, KD Lernu, DVD Esperanto Elektronike ebligis allogi la publikon kaj montri, kio estas la internacia lingvo Esperanto.

Sabate deĵoris membroj de nia asocio: Frédéric Porretti, Simone Kiry, André Grossmann. El Frajburgo venis Manfred Westermayer kaj samokaze montris vestaĵojn faritajn je 10 ĝis 40% per urtiko-fibroj. Li

klarigojn en la germana, franca kaj Esperanto.

Dimanĉe volonte ankaŭ deĵoris Roberto Kueny, kiu sukcesis kapti la atenton kaj pasie rakontis pri sia vojaĝo al Laponio.

La Esperanto-kalendareto de JEFO ebligas allogi junajn vizitantojn, kiuj iel malkovris la lingvon.

Ni sukcesis vendi KD-on DVD-on kaj la serion de kartonaj informiloj "Essentiel".

André Grossmann



L'espéranto dans le texte

L'espéranto a changé la vie de Bruno Henry. Il peut désormais voyager et se faire comprendre dans le monde entier. Le président de l'association Thionville-Espéranto entend transmettre son savoir à d'autres. Rencontre.

Sur la table de la cuisine, livres et cahiers ont remplacé les couverts, comme autant de nourritures spirituelles. Car le Nilvangeois Bruno Henry a soif de dépaysements et de terres étrangères. Il s'assoit devant son trésor : des dictionnaires d'espéranto, des méthodes de langues, ainsi que quelques œuvres, originales ou traduites. Et au milieu, des enveloppes aux timbres oblitérés au bout du monde. Indiquant des missives venues de Sibérie et de l'Annapurna. Bruno Henry indique : « Nous nous servons de l'espéranto pour communiquer, par téléphone et surtout d'Internet maintenant. D'ailleurs, là, il y a un Chinois qui cherche à me joindre. »

Ce cheminot, président de l'association Espéranto Thionville, n'a pas toujours parlé de la sorte. C'est à 35 ans qu'il découvre son nouveau monde : « Je n'étais pas doué pour les langues, ça ne me branchait pas. Alors que l'espéranto, c'est beaucoup

plus simple, l'apprentissage demande cinq fois moins de temps que pour une autre langue. » Celui qui dispense désormais des cours dans l'association, Bruno Henry poursuit : « Tout d'abord, la grammaire est simple. C'est phonétique, clair, toutes les lettres se prononcent et il n'y a pas d'exception. » Oubliées les déclinaisons, terminées les conjugaisons impossibles, révolus les accents toniques qui ont la bougeotte. « On accente toujours sur l'avant-dernière syllabe. »

La raison de cette simplification à l'extrême est historique : que les communautés puissent se comprendre dans une Pologne écartelée entre ses puissants voisins russes, prussiens, lituaniens, et biélorusses. Le site Espéranto France, dont fait partie Bruno Henry, rappelle : "L'espéranto a été proposée par un médecin polonais en 1887 pour faciliter la communication entre tous ceux qui n'étaient pas de même langue maternelle. Il a

signé son projet de langue par Doktoro Esperanto, d'où le nom."

« Idéal pour communiquer »

Et que les puristes ne se donnent pas le mal de brandir l'argument de l'appauvrissement linguistique, Bruno Henry abdiquerait tout simplement en inclinant la tête, « c'est juste idéal pour que les gens simples puissent communiquer ». Et d'expliquer que sans cet outil, il n'aurait sans doute jamais pu voyager autant, rencontrer tant de gens. « C'est pour ça que m'y suis mis, j'avais un intérêt pour les autres peuples, j'aime voyager et je voulais comprendre ce que disent les gens, sans interprète. » Après un premier échange avec des Tchèques, le Nilvangeois et son épouse partent pour un périple « de trois semaines en train. On a été en Tchéquie, et puis en Russie, on s'est arrêté à Moscou et on est monté au Nord, à Akhrangelsk, là-bas, la mer est gelée huit mois de l'année ! Ensuite on est

redescendu vers Saint-Pétersbourg. »

Le globe-trotter a aussi mis le cap sur la Hongrie, la Bulgarie, la Norvège, la Slovénie, l'Autriche, l'Allemagne. « Nous campons ou nous logeons chez l'habitant, ça permet de rencontrer des gens. On ne pense plus que les gens sont étrangers, on forme une communauté. » Le voyageur aimerait maintenant découvrir le Népal, Cuba, le Daguestan (république russe voisine de la Tchétchénie). Autant de contrées que des ressortissants sont déjà venus présenter et conter lors de conférences à Thionville et dans la vallée de la Fensch, à l'invitation de l'association des espérantistes.

En attendant de pouvoir boucler à nouveau son sac, Bruno Henry se replonge dans ses ouvrages, potasse ses préfixes si pratiques, « c'est comme un jeu de construction », s'exclame-t-il. Comme quoi la grammaire peut rendre très heureux.

Charline Poullain.



11 novembre 2007

Association : esperanto-thionville@laposte.net. Site : <http://www.esperanto-thionville.ass0.fr/>; tél. 03 82 53 25 47 ou 03 87 73 95 57.

Prochains cours d'espéranto au centre Albert-Camus de Nilvange les 15 et 29 novembre, de 20 h à 21 h 30, puis un jeudi sur deux par mois.

NILVANGE (Moselle) —————★

Esperanto-kurso por komencantoj komenciĝis en oktobro, dufoje monate ĵaŭde, de la 20a00 ĝis la 21a30 en la Centro "Albert Camus" de Nilvange apud Hayange. Pli ol 12 komencantoj partoprenas. Marcel Redon instruas laŭ metodo "cours rationnel d'Espéranto" de SAT-Amikaro kaj helpas Bruno Henry. Starigis la kurson Esperanto -Thionville kun "Forum des citoyens" de Nilvange.

Informoj ĉe ttt-ejo <http://www.esperanto-thionville.ass0.fr>

Au Centre Albert Camus, le 7 mars 2008 à 20h15, Anne-Sophie Markov, professeur d'histoire à Montigny-le-Bretonneux (78) et auteur d'un mémoire de maîtrise d'histoire sur "Le mouvement international des travailleurs espérantistes 1918 - 1939" fera une conférence sur ce thème et évoquera le rôle de l'Espéranto et des travailleurs espérantistes dans la guerre civile d'Espagne ainsi que dans les brigades internationales. Elle parlera aussi de l'histoire des différentes associations de travailleurs espérantistes.

Organisateur : Forum des Citoyens et Espéranto -Thionville.

Speaker le french,
c'est has been !

Prix de la Carpette anglaise...

Une distinction non désirée !

Pastiche de distinction littéraire, le prix de la carpette anglaise est un bon baromètre de l'usage du français par nos élites.

par Pierre FRANCOIS

En cette saison où les prix littéraires tombent comme les feuilles des arbres, l'Académie de la carpette anglaise n'a pas manqué à sa mission de défense du français dans la bonne humeur (relative, depuis le changement de président de la République) en remettant le 21 novembre dernier son prix à des personnalités qui n'en demandaient pas tant à l'issue d'un repas au... buffet de la gare d'Austerlitz.

Rappelons que le prix de la Carpette anglaise est décerné chaque année "*à un membre des élites françaises qui s'est particulièrement distingué par son acharnement à promouvoir la domination de l'anglo-américain en France au détriment de la langue française*"

Le jury, présidé par *Philippe de Saint Robert*, était composé de représentants de l'Association pour la sauvegarde et l'expansion de la langue française (Asselaf), l'Avenir de la langue française (ALF), du Cercle des écrivains cheminots (CLEC), de Défense de la langue française (DLF) et du Droit de comprendre (DDC). À ces membres traditionnels avait été ajouté pour la première fois un représentant du monde syndical en la personne de *Jean-Loup Cuisiniez*, délégué CFTC qui œuvre depuis plusieurs années pour le droit de travailler en français en France, notamment sur les programmes informatiques et contre les discriminations linguistiques à l'embauche. Les candidats pour le prix ainsi que le prix spécial à titre étranger ne manquaient pas.

En tête de liste, on trouvait l'hôpital **Jean Monnet d'Épinal** qui a piloté pendant plusieurs années ses appareils de radiothérapie avec un logiciel en anglais, ce qui a conduit à l'irradiation excessive de centaines de personnes, dont **cinq sont mortes** et dix neuf gravement handicapées. Suivait le couple formé par *Valérie Pécresse* (ministre de l'enseignement supérieur) et *Jean-Pierre Jouyet* pour avoir fait la promotion du protocole de Londres dans un article publié en septembre 2007.

Pour le même motif, *Jean-Marie Bockel*, secrétaire d'État à la Francophonie faisait aussi un candidat paradoxal mais possible.

Deux autres ministres figuraient dans cette liste : *Xavier Darcos* (Éducation nationale) pour avoir promu le bilinguisme au lieu du plurilinguisme et *Christine Lagarde* (Économie et Finances) **pour correspondre avec ses services en anglais.**

En queue de liste, on trouvait de façon assez surprenante *la société Peugeot*, qui avait lancé une campagne de communication intitulée "*Blue Lion*". À titre étranger, il n'y avait que trois candidats. En tête de liste, on trouvait *Christine Albanel* (ministre de la Culture et de la Communication) pour avoir lancé une "réflexion" sur les synergies possibles entre TV5 Monde, France 24 et RFI sans y associer nos partenaires suisses, canadiens et belges sans lesquels TV5 Monde ne serait pas ce qu'elle est.

Suivaient *Jacques Barrot*, vice président de la commission européenne qui a favorisé une directive **imposant aux pilotes français de parler anglais en France et entre français** et la police de Genève pour avoir diffusé une publicité intitulée "*United Police of Geneva*".

C'est au second tour de scrutin que le prix a été décerné à **Christine Lagarde** par huit voix contre quatre à **Jean-Marie Bockel**. Et en ce qui concerne le prix spécial à titre étranger, le jury a voulu marquer sa solidarité avec les Suisses romands : c'est donc la police de Genève qui a reçu le prix "d'indignité civique" à ce titre.

Si les années précédentes on notait une certaine bonhomie au moment de la remise du prix, cette année les fronts étaient plus plissés. Il n'est pas incongru de rapprocher ce fait du nombre de candidats *membres du gouvernement...*





BONJOUR, VOISIN !

La grupo de Sarreguemines iniciatas serion da aranĝoj «Bonjour, voisin !» por pli amplekse koni kaj konigi niajn eŭropajn najbarojn samcivitajn.

Esperanto tiel aperas ne nur kiel lingva afero, sed emo de praktika klopodo por plia interesiĝo al la eksterlanda « mondkaruselo ».

Tia ĉiu-fintrimestra kunveno disvolviĝas laŭ jena programo:

geografia kaj historia prezentoj de la lando;
literatura alpaŝo, dank'al du verkistoj;
aŭskulto de tiulanda muzikteamo;
diversaj informoj (turismaj).

La 8-an de decembro okazos tia kunveno.

Ĝi prezentos Finnlandon. La dokumentaron ni trovis en la urba mediateko, en la Reto, en la turisma finnlanda oficejo en Parizo.

Sed la plej gravan kontribuon, pri literaturo, havigis al ni esperantistino, S-ino Raita Pyhälä.

Ŝi proponis sian plej ŝatatan verkistinon, Edith Södergran, kiu ja alireblas en Esperanto, sed ankoraŭ ne en la franca. Ŝi elektis kvar poemojn de tiu elstara poetino, ĉerpitaj el la verko *Lando malekzista*, kolekto de jam esperantigitaj poemoj.

Ni tiel havos taŭgan argumenton por sentigi la originalecon de la esperanta literaturo kaj la valoron de niaj elŝanĝoj.



Prezentos la historian parton profesoro pri historio ; aktorino deklamos la poemojn.

La kunveno malfermiĝos al publiko elektita per invitkartetoj. Tiel ni savos amikecan etoson kaj semos iom da simpatio en nemembrisiga publiko.

(Raporto aperos en venonta « La Informilo »)

Omaĝe al Edith Södergran (1882 – 1923)
kaj al la esperantiginta D-ino Sabira Ståhlberg

el la kolekto *Lando malekzista*

Edith Södergran incisis novan vojon en sia landa literaturo. Ŝi pionire skuis la finnan kulturmondon per poemoj sen rimo kaj ritmo. Post primoko kaj malestimo, ŝia poezio hodiaŭ elstaras kaj ege ŝatatas en Finnlando.



NI INOJ

Edith Södergran

Ni inoj tiom proksimas la brunan teron.
Ni kukoloj demandas pri esperoj printempaj,
ni ĉirkaŭbrakumas pinon senŝelan,
ni esploras pri signoj, konsiloj krepuske.
Mi amis viron foje, sed li kredis pri nenio...
Li venis frostan tagon kun okuloj vakuaj,
Li iris pezan tagon kun forgeso surfrunte.
Se mia ido malvivas, ĝi estas lia...

ĈU KONTRAŬ-STAREBLAS AL EVOLUO ?

En la centro de Sarreguemines elkreskis impona konstruaĵo. Ĝi beligas la urban bildon ĉe la rivero Sarre kaj apud la elŝipejo por laŭriveraj turismantoj, kiuj paŭzas en Sarreguemines. Ĉefe germanaj.

La trietaĝa domego entenas ampleksan mediatekon, galerion de diversaj vendejoj. (Tiu fieriga realigo de la komunuma skipo argumente pezos dum la venonta balotkampanjo). Tie ankaŭ supervendejo de nutraĵo tre kontentigas la loĝantaron de la urbocentro.

Ĉu ĉio glatis? Nu! la fremdlingva nomo de la super-vendejo, *Simply Market*, tronis grandeg-litere sur la domego, kiu parte estas komunuma. Plie tiu komercejo uzaĉis fremdlingvajn sloganojn, afiŝe kaj varbfolie.

Fremdaĉaĵoj ĉirkaŭas nin !

La vendejestro ricevis mian argumentitan leteron pri ne akcepteblaĵoj tiaj. La urbestro ricevis kopion de la civitula letero kaj peton, ke li bonvole postulu malpli da okulbatoj far de senĝene ĉionregemaj komercejoj.

KAJ KIO OKAZIS ?

Simply Market draste reduktis sian eksteran komerc-panelon. Ĉu maloftos lingvaj tedaĵoj sur ĝiaj varbfolioj?

Extraits de la lettre adressée au directeur d'un commerce qui utilise l'anglais en affiches et en slogans :

... « Un Français n'a nul besoin d'une langue d'emprunt pour s'exprimer clairement, ni pour se faire entendre par ses concitoyens.

Je conteste la liberté que vous prenez de placer notre langue au second rang.

Vous vous appuyez sur des exigences de publiciste : elles répugnent au citoyen qui sait, lui, que notre langue doit être défendue, à notre porte maintenant, pied à pied.

Je formule une simple prière – (*simply a prayer*, pour votre contentement) :

« Ne donnez pas trop dans cette direction, qui se gargarise d'être internationale et évoluée, en privilégiant la langue du plus fort, du plus riche et, forcément, du plus arrogant. »

Pourquoi votre publicité devrait-elle heurter l'acheteur ?

Nous serons bien chez nous, tant que nous nous sentirons dans les murs d'une ville qui ne sacrifie rien de son patrimoine à un progressisme aliénant. » A. HUBERT

Pri Suŝi:

Suŝio estas tipa japana manĝaĵo. Ĝi estas buleto de rizaĵo kun fiŝpeco sur ĝi. La plej populara fiŝo por siŝio estas tinuso. Supre metitaj estas ne nur fiŝo, sed ankaŭ aliaj maraj frandaĵoj, ekz. kankro, sepio aŭ polpo. Ankaŭ ovaĵo estas ofte uzata. Antaŭe suŝio ne estis



Ankaŭ en hejmoj oni volonte manĝas suŝiojn. Jen du pladoj menditaj ĉe suŝiito.



Jen restoracio kun turniĝanta portoĉeno por ebligi al la klientoj elekti deziratajn suŝiojn

tiom populara, sed pro apero de "Kaitenzuŝi", nome "turniĝanta suŝio", hodiaŭ suŝio tre populariĝis. En Kaitenzuŝi-restoracio suŝio estas servataj sur telero per moviĝanta portoĉeno antaŭ gastoj.

Nuntempe suŝio estas ŝatata ne nur en Japanio, sed ankaŭ eksterlande.

Fotoj: Andreo Grossmann

La recepto de avinjo Odette

(tiu-ĉi jam aperis siatempe en la bulteno de TAKE, sed pluraj legantoj petis ĝin denove).



FLAMKUKO

Aĉetu pan-paston ĉe la panisto... aŭ faru ĝin per 500 g de faruno, iomete da salo, 25 g da biergisto, kiun vi diluu en iomete da varmeta akvo. Metu ĉiujn ingrediencojn en ujon.

Aldonu sufiĉe da akvo por havi taŭgan paston, kiun vi rulpremos. Knedu la paston ĝis ĝi ne plu gluu ĉe la manoj. Tiam lasu ĝin kreski en varma ejo.

Nun vi bezonas 500 g da kazeo, 150 g da dika kremo,


200 g da fumajita lardo, cepojn.

Miksu la kazeon kun la kremo kaj kulerpleno da faruno, aldonu iomete da salo. Tranĉu la fumajitan lardon, tranĉu la cepojn kaj kuiru ilin kun kulerpleno da oleo dum kelkaj minutoj.

Elprenu etan kvanton de la pasto, rulpremu ĝin tre maldika.

Ŝmiru kazeon sur la paston, disŝutu lardpecojn kaj cepojn sur la kazeon kaj baku vian "FLAMKUKON" en varmega bakujo, prefere en bakujo hejtata per ligno.

Frandu kun alzaca esperanto-vino !



Bonvolu noti...

63a Kongreso de SAT-Amikaro à ANTONY

22a ĝis la 25an de marto 2008

Nacia Kongreso de Esperanto-France à MARTIGUES

8a ĝis la 12a de marto 2008

... ĉiuj informoj *rete*

Josef LADA : KRONIKO DE MIA VIVO

Josef LADA (naskiĝis la 17-a de decembro 1887 en Hrusice -mortis la 14-a de decembro 1957 en Prago), estas ĉeĥa pentristo kaj desegnisto, ilustrinto de klasikaj satiraj verkoj Brava soldato Ŝvejk, Bapto de caro Vladimir kaj precipe de multaj libroj por infanoj. Por lia arto estas karakteriza dika konturo kaj simpligitaj, sed vivaj formoj, tre facile kompreneblaj por etaj legantoj. Liaj vintraj motivoj tre ofte aperas sur bildkartoj, precipe Kristnaskaj.

Verkisto mi ne fariĝis el ia sopiro pri literatura famekonateco, sed nur pro tio, ke mi al ĝi estas devigata. Ambaŭ miaj gefiloj min ofte petis, ke mi rakontu al ili, kion mi faris, kiam mi estis infanaĝa. Do mi rakontadis, kiel mi ludis kun botistaj bot-ŝtipoj, kiel mi en vintro glitis kaj glitveturadis, kial mi bovojn paŝtis kaj kion ĉion mi faris. Jam mi eldiris ĉion kelkfoje, sed ili petis denove kaj denove kaj do mi devis elpensadi historietojn. Tiel mi al ili rakontis ankaŭ, kiel ni hejme havis virkatan Mikeš, kiun mi instruis home paroli, iradi sur malantaŭaj piedoj en botoj kaj ĉapo. La du infanoj tion kredis kaj ĉiam volis, ke mi rakontu nur pri Mikeš. Ili demandis pri ĝia sorto, ĉu ĝi ankoraŭ vivas, kaj mi devis al ili klarigi, ke ĝi fuĝis en la mondon kiam ĝi foje al avineto disrompis lakto-poton, kaj ĝi ne plu revenis. La duan jaron dum ferioj en HRUŠICE malfrue vespere kaj ni jam iris dormi, ekstere sur la strato aŭdiĝis miaŭado. Mi diris al la gefiloj, ŝerco, ke eble Mikeš revenas el la mondo kaj ili tuj leviĝadis kaj volis sin vestadi por malfermi la porteton al Mikeš. Ili forgesis ke Mikeš tragrimpus la porteton tute facile. Longe daŭris ĝis kiam mi la gefilojn konvinkis, ke jam intertempe Mikeš foriris al onklineto en la vilaĝon. Sed matene en krepusko la infanoj kuris en la vilaĝon por demandi la onklineton, ĉu Mikeš ĉe ŝi dormu. Do la onklineto multe strebis por diri ion kontentigan.

Iam somere en 1932 al mi venis F. KRCH, redaktoro de "Ĝojoj" (Radosti) elekti iajn desegnaĵojn por aperigo. Senatende li demandis Alenka-n, ĉu la patro al ili ion rakontas. Alenka al li eldiris la tutan historion pri Mikeš kaj la redaktoro min tuj petis, ke mi verku pri Mikeš en lia gazeto. Do, mi skribis, kiel mi instruis al Mikeš paroli kaj iradi en botoj, en kiuj ĝi ankaŭ iradis glitkuri kun mi inter infanojn sur la Jedlička-pluvmarĉeto. Mi pensis, ke per tio ĉio finiĝis, sed mi ege eraris. Baldaŭ poste, post aperigo de l'artikolo pri Mikeš la redaktoro denove aperis kaj pro ĉio petis por skribi ankoraŭ ion pri la virkato, ke tio al infanoj tre plaĉas kaj nepre ili volas koni pluajn sortojn de Mikeš. Mi pensis, ke post certa tempo la infanoj enuos legi pri tio, sed ĉiam plinombriĝadis la infan- kaj matur-petantoj kaj mi devis elpensadi novajn kaj novajn historiojn de Mikeš. La redaktoro ĉiun monaton devis el mi "stangolevadi", ĉar mi havis multe da alia laboro kaj la verkado min tro pezigidis. Ankaŭ

mi ricevadis senpere multe da leteroj de infanaj legantoj, kaj finfine mi verkis eĉ por miaj propraj gefiloj. Fine de la dua jarkolekto mi skribis en lasta numero, ke Mikeš al avineto disrompis grandan laktopoton, tio tiom timigis ĝin, ke ĝi kolektis sian modestan posedajeton kaj foriris en la mondon

kaj ke ni rezignis pri ĝia denova reveno.


La infanoj sen mezure bedaŭris Mikeš-on kaj en leteroj ili petis, ke mi ĝin serĉigu, ĉar ili sentas mankon de ĝi. Dum ferioj en Hrusice la infanoj min denove demandis, ĉu Mikeš el la mondo revenos. Vidinte iliajn tristajn okulojn mi promesis eldemandi pri Mikeš. Sed post la ferioj en la unua kajero de la jarkolekto, aperis tute nova virkateto, kiun mi havigis kiel bubo anstataŭ la perdita Mikeš. Mi skribis, ke ĝi ne estis tioma bravulo kiel Mikeš. Ĝi estis ĉiam malgrandeta, malviva, ĉion malbone lernanta kaj ĝenerale ĝi estis sentaŭgulo.

Kaj la infanoj amase protestis, ke ili ne volas tioman sentaŭgulon, kia estas tiu nova virkateto, ili volas Mikeš-on. Do mi devis plenumi la deziron kaj skribi, ke Mikeš unue sendis el la mondo leteron al PAŠÍK kaj BOBEŠ kaj poste ĝi mem alveturis, kun granda gloro kaj tiom riĉa, ke ĝi havis radportilon plenan da ora formetaĵo. Inter la etaj legantoj ekestis ĝojkriado kaj la historio pri Mikeš pluentiriĝis. Oni ĝin legis en la unuaj klasoj, ĉar mi ĝin verkis per neta skribstilo kaj ĝenerale uzadis kiel eble vortojn, kiujn la pli junaj infanoj konas. Ĉe miaj knabinoj mi ja konvinkiĝis, ke la pli junaj infanoj konas nur malmulte da vortoj. Eĉ multajn fabelojn skribitajn per literatura stilo, mi devis al ili legi en lingvo al ili komprenebla, ĉar multajn esprimojn ili ne konis kaj tiel estis al ili nekompreneblaj eĉ tutaj frazoj. Tial mi donis al ili legi tion, kion mi verkis por infanoj kaj ŝanĝis la nekonatajn esprimojn per pli simplaj kaj pli alireblaj. Pere de tiu ĉi praktiko mi akiris konvinkon, ke oni ne devas por pli malgrandaj infanoj skribi per rafinita lingvo kaj mallerta skribstilo. Mi memoras, ke en la unua klaso ni kantis la kanton: « Ke Dio nin amu... », kaj « nenion ni petas, nur tion la saman », ni kantis laŭ antaŭa akcento: nur la samon » kaj vane ni rompis la kapon, kion ni ja tion « faras, kiam ni nur » tionsamas ».

Verkisto de libroj por pli junaj infanoj devas uzadi pli mallongajn frazojn, devas eviti malobeojn kaj vortojn malfacile elparoleblajn. En la okazaĵo oni ne parolas pri gravaj lezoj, doloro kaj teruraĵoj ĝenerale. La sceno devas esti gaja, kaj interesa kun kaŝita eduka tendenco, ke por la legaĵo ekplaĉu al lernanto, kiu ĝuste ellernis legi. Tial en la lernolibroj ne devus esti senspiraj poemoj al la infano nenion dirantaj. La fino de la sceno devas esti ĉiam feliĉa, pozitiva. Mi rememoras, ke mi




La nigra kato Mikeš



kiel lernanto batis per la libreto « Mizera Milena » prunteprenintan el lerneja biblioteko. En ĝi estis priskribata mallonga vivo de brava knabineto bonfaranta por finfine ricevi neatenditan repagon. Ŝi droniĝis. Ĉar nek la maturaĝulo ŝatas en legaĵoj similajn finojn kaj la infano ne devas seniĝadi de fido je bona repago por honesta laboro kaj bonfarado.

Do, kiam mi al malgrandaj legantoj bildigis, kion Mikeš en la mondo scipovis, kiel ĝi al homoj helpadis kaj bonfaradis en sia denaska civito, nur tiam ili ĝin estimis. Kelkaj infanoj ja alveturis kun la maturaĝuloj en denaskan Hrušice de Mikeš por vidi, kie ĝi naskiĝis, kie ĝi glitkuradis kaj tra kie ĝi iris en la mondon. Kaj ili tute ne miris, ke la riĉa Mikeš kun riĉa porkido studigis sian kamaradon Pepík. En 5 jarkolektoj mi skribis (Ĝojoj: Radosti) nur pri Mikeš kaj ĝiaj kamaradoj kaj la intereso de la infanoj ne sinkis, ĉar en la lernejojn alvenadis ĉiam novaj kaj novaj legantoj. La rakontado pri la virkato aperis poste en kvar volumoj, ĉiun jaron unu (1935-37). La verkaĵo pri Mikeš estis honorigita en 1936 per Rambousek-premio, kiun oni donacis por la plej bona infanlibro de la jaro.

Post Mikeš mi verkis en la « Ĝojo » pri prudenta vulpino, kiu ankaŭ ellernis paroli kaj la tutan regionon



mirigadis per siaj eventoj. Kiam mi rakontis kiel ĝi skribis leteron al kolbasisto en la urbo, ke tiu kaj tiutage venos en la vendejon guste tagmeze por preni du ŝinkojn, kaj sinjoro ĉefbarbaristo vetis

100 kronojn, ke la kolbasisto ludperdos, tial la infanoj ne povis fin-atendi la pluan volumon kaj ĉiuj konkorde staris ĉe kuraĝa vulpino, kiu gajnis la kompostadon. Finfine la vulpo fariĝis ordema princa arbaristo kaj gardis fidele arbarojn por la princo-sinjoro, kiu ĝin tre estimis kaj ofte vizitadis ĝin, ĉe kio li ofte rememoris, kiel ĝi lin el lia propra arbaro elpelis. Aperis kiel verkaĵo en 1938.

En plua volumo estis rakontado « Pri timigiloj kaj niksoviroj ». Tion mi skribis por malgrandaj legantoj, ke ili ne timu la timigilojn, niksovirojn kaj aliajn ĉifonfigurojn, per kiuj la malsaĝaj gepatroj kaj ĝenerale la maturaĝuloj ŝate ilin timigas. Mi konvinkis la infanojn, ke ĉiuj timigiloj estas ja ridindaj kaj ofte eĉ mem timas. La morala instruo de tiu ĉi libreto estis, ke la fiero antaŭenirigas la falon, kaj ke tiu ĉi ververa proverbo validas ankaŭ por la timigiloj. Eĉ ili malsukcesos, se ili fariĝos fieremaj kaj maldiligentaj. Malbone finis eĉ la BUBÁK-timigilo, la filo de Mulisák, kiu estis jam maldiligenta por timigadi persone kaj prizorgis al si komfortan, mekanikan timigadon. La verkaĵo aperis en 1939 kaj 1953. La lastan libron por junaj legantoj « Fabeloj renverse » (POHÁDKY NARUBY) mi aperigis en 1940. Ĉiuj same aperadis en gazeto « Ĝojo » - Radost -, nur la fabelo pri maldiligenta HONZA estis en « Tilio » - Lípa.

Tiujn ĉi 8 volumetojn de infana legaĵo mi neniam es-

tus verkinta, se ne estus grava kunlaboro de la redaktoro F. KRCH, kiu min ne nur devigadis en ĉi-tiu laboro, sed li estis mia bona konsilanto, li mem estis longtempa edukanto de junularo. Ankaŭ granda intereso de la plej junaj legantoj min inspiradis kaj multe da leteroj de infanoj el ĉiuj anguloj de nia patrujo estis mia la plej kara rekompenco. Nur en III-a klaso de unu lernejo (Slin-urbo) mi ricevis je unu fojo pli ol 30 leterojn ornamitajn per floroj kaj desegnaĵoj de Mikeš, Pašik kaj de saĝa vulpo. Multaj fabeloj estis radioelsendataj kaj dramigitaj por enscenigo, estis « Bubáci a Hastrmani » kaj pri Mikeš. La fabelo « Bubáci a Hastrmani » estis dramigita de Fr. NOVOTNÝ kaj prezentata en Brno-landa teatro. La fabelo « Pri Mikeš », aranĝita por la teatro de d-ro PORT, estis prezentata same en 1940 en Vinohrady-urba teatro. Por la du enscenigoj la scen-aranĝon proponis mi mem.

La libron « Straky na vrbě »-Pigoj sur saliko » aperinta en 1940, mi verkis por maturaĝaj adorantoj de popola humoro. La materialon mi plejparte akiris dum miaj someraj restadoj en denaskaj HRUŠICE ĉe konstruado de familia domo kaj per kontakto kun kelkaj popolaj humoristoj. La lastaj apartenantoj de malnova generacio, kiu havis grandan simpatian – sencon por la humoro. Mi konsideris kiel devon konservi ilian popolan spritaĵon kiel kulturalan trezoron. Precipe tiun el medio de masonistaj homoj, pri kiu eble nenie oni skribis kaj kiu estas senpere, tipa specimeno de nia popola humoro. Same tiel la fungoserĉanta latinan lingvon en tiom elstreĉita hiperbolo ankoraŭ nenie estis prilaborita, eble ĝi egalvaloras al latina lingvo ĉasgardista. Sed tio estas humoro plejparte de pli aĝa generacio. La pli juna havas sencon nur por praktikaj detaloj de la vivo.

Mi finskribas la lastajn liniojn de la « Kroniko ». Mi ripetis mian vivon, kiu estis gaja, foje ankaŭ malgaja, sed certe bela kun iom da humoro ĉiam elportebla. Neniom ni malesperis. Kun la vivo mi ĉiam sciis batali ĝojigi. Estas multe da dokumentoj pri tio en la verkaĵo. Kaj tiamaniere la libro volas esti eĉ ekzempla. Tiu terpeco inter HRUŠICE kaj Prago, belega regiono, estis mia vivo, mia paradizo, mia inspiro.

Verkisto kaj pentristo; pentristo kaj verkisto. Rensversu tion kiel vi volas. Mi mem kredas nur en fortaj travivaĵoj de junaĝo, bonajn homojn, sentemajn korojn kaj fidelan amon. Tio estas pura fonto belartista. Regadi la plumon aŭ penikon – tio estas jam nur tekniko, tio estas detalo.

La fontoj de belarto viva kaj vivema estas aliloke, ili estas pli profunde, estas tre profunde. La fontojn ne eblas ellerni, ili ne estas acetebloj. Temas pri donacoj Diaj, por kiuj ĉiu el ni devas esti dankema.



HRUŠICE, naskiĝ-vilaĝo de Josef Lada



El nia libroservo

Informoj



⇒ **La libroservo partoprenos la 62 an regionan staĝon de esperanto en Vigy la 2an-3-4 ajn de majo 2008** Se vi volas certe trovi deziratan libron tie, mendu gxin antaŭe al la adreso poŝta aŭ reta de la libroservo (libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR 54500 VANDŒUVRE libroservo.efe@wanadoo.fr)



Nove (re)alvenintaj libroj



1)




2)



3)



4)



5)

1) **Fundamento de Esperanto**, lingvo, 358 p, **Zamenhof**, *Edistudio*. **18,00 €**. Tiu baza libro de Esperanto -certe ne nova- estis represata ĉi-jare de Edistudio. Ĝi prezentas seslingve la 16 neŝanĝeblajn gramatikajn reguloj, ekzercaron kaj universalan vortaron.

2) **La Malemuloj**, Romano 264 p, **Verga** *Edistudio*. **18,00 €**. Sicilia romano de fama verkisto de la XIXa jarcento.

3) **Rememoroj pri tempo de silko kaj pajlo**, Rakontoj, 268 p, **Ĵuniĉi Saga**. *Ad Rem*, **26,00 €**. 64 rakontoj pri la vivo de diversaj homoj en Japanio.

4) **Winnie la Puh**, Infanlibro, 166 p, **A.A. Milne**, *U.E.A.*, **12,30 €**. Denove disponeblas la libro pri urseto!

5) **La flava hundo**, Krimromano, 120 p, **Simenon**, *Sezonoj*. **12,00 €**. Nova enketo por la franca komisaro.

Por mendi librojn:



.1 Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDŒUVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)
- per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»
- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 euroj por adreso en Francio))

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo. Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo

MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

- S-ro/ino
-
-
-

En

la

Subskribo:

Nos cotisations 2008

Vous venez de recevoir le dernier numéro de notre bulletin trimestriel, **LA INFORMILO** pour la période 2007. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement pour 2008 (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 2008 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Nous espérons ainsi vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT ?

1. Association Régionale ESPÉRANTO FRANCE-EST :

La cotisation à notre Association Régionale ainsi que l'abonnement à **LA INFORMILO** sont à payer:

- de préférence par virement postal à **Espéranto France-Est CCP 1997 72 W NANCY** n'oubliez pas de mentionner sur la ligne de message le but de votre paiement et si possible votre code-adresse.
Ex. Abono Inf + kotizo 2008 por 756
- par chèque bancaire à l'ordre de **Espéranto France-Est**, mais adressé à notre trésorier: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse.

Abonnement et cotisation pour les années:	2008	2009	2010
Abonnement simple à La INFORMILO adresse en France	12 €	12 €	12 €
adresse à l'étranger	16 €	16 €	16 €
Adhésion simple à l'Association Espéranto France-Est			
• Membre fédéral avec abonnement à <i>La INFORMILO</i>	18,50 €	18,50 €	18,50 €
• Membre fédéral sans abonnement à <i>La INFORMILO</i> , pour les autres membres de la famille par exemple.	6,50 €	6,50 €	6,50 €

2. Association Internationale UEA (cotisations 2008)

Les cotisations à l'UEA peuvent être payées directement à notre association Espéranto France-Est par l'intermédiaire de notre trésorier S-ro André GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM qui transmettra dans les meilleurs délais.

Veillez noter le code de la cotisation que vous payez (cotisation UEA MA)

UEA	• Membre individuel reçoit le petit guide de l'UEA	MG	9 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA	MJ	23 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30 ans)	MJ-T	23 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA + la revue mensuelle ESPERANTO	MA	58 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	MA-T	58 €

3. Association Nationale Espéranto-France (UFE) (cotisations 2008)

Les cotisations à l'UFE sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 85535D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 2007 de l'UFE. **Votre adhésion à notre Association Régionale est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88.**

Par contre l'abonnement à **LA INFORMILO** est à payer à notre Association Régionale, mais jamais à l'UFE.

UFE	• Membre actif d'Espéranto-France	33 €
	• Membre actif d'Espéranto-France et d'Espéranto-Jeunes. (moins de 30 ans au 1.1.2008) (reçoit Jeunesespéranto infos.)	30 €
	• Tarif réduit pour étudiants, chômeurs	15 €
	• Abonnement au magazine bimestriel Le Monde de l'espéranto . (pour les membres d'Espéranto-France)	+22 €
	• Abonnement au magazine bimestriel Le Monde de l'espéranto . (plein tarif)	30 €

IMPORTANT

- Les nouveaux adhérents à l'Association Régionale, recevront par courrier séparé leur carte de membre ainsi qu'un exemplaire des statuts de l'Association.
- Les cartes de membre de l'année 2008 et éventuellement de l'année 2009 seront envoyés aux autres membres d'ESPÉRANTO FRANCE-EST par courrier séparé avec des informations spécifiques réservées aux membres.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2008 ĝis 2010

Jen la lasta numero de **La Informilo** por la abon-jaro 2007. Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj jaroj 2008 ĝis 2010. Vi povas kontroli sur la unua linio de via adres-etikedo, ĉu jam estas pagita via abono por la jaro 2008. Tiam estas menciita 2008-A. Se ne, ni invitas vin senprokraste pagi vian abonon al **La Informilo** kaj vian **membro-kotizon** al nia asocio laŭ la ĉi-subaj tarifoj kaj laŭ la menciitaj pag-eblecoj.

Sam-okaze eblas pagi vian UEA-kotizon laŭ la ĉi-suba tarifo al nia kasisto, kiu senprokraste ĝin perados al UEA.


Jaroj:		2008	2009	2010
Abono por adresoj en Francio:		12 eŭroj	12 eŭroj	12 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:		16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
Federacia kotizo:		6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
UEA	MG	• Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado.		
	MJ(-T)	• Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 29jaroj membro en TEJO kun <i>Kontakto</i> kaj <i>TEJO Tutmonde</i> sen plia pago).		
	MA(-T)	• Individua Membro kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto		
		9 eŭroj	23 eŭroj	58 eŭroj
Pagmanieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2008 por 1027			
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2008, 2009 ktp. Se necese menci vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.			
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)			
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menci la celon de via pago kaj vian adreskodon)			
Vi povas sam-okaze mendi jenajn librojn jam menciitajn en la antaŭa numero 138		Rememoroj pri Tempo de Silko kaj Pajlo Kolekto de rakontoj pri malnova Japanio, inter la fino de la 19a jarcento kaj la nuna moderna Japanio Poŝamiko: Tre plaĉa poŝ-forma kajereto kun multaj koloraj ilustraĵoj pri gramatiko, bildvortaroj kaj kelkaj ekzercoj.		26 eŭroj
				6,50 eŭroj

apprendre
l'espéranto...

rapidité...
efficacité...

- ★ un matériel adapté
- ★ une technique éprouvée
- ★ un réseau d'animateurs compétents
- ★ un savoir immédiatement opérationnel

“ ***? ...
- **** ... ! ”




...chez soi !

*deux maîtres-mots
de notre cours
par correspondance !...*

Edmond LUDWIG
26 route de la Schlucht
68140 STOSSWIHR

*une diffusion
sur toute la région
...et au-delà !*



J A R KOLEKTO DE TAKE 2007**ENHAVO**

En decembro 2007 aperis la nova eldonaĵo de TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj), nome la **JARKOLEKTO de TAKE 2007**. Temas pri 48-paĝa libreto en formato A5. Ĝin redaktis Bronislav ĈUPIN el Iĵevsk, (Rusio). Kvin aŭtoroj kontribuis per artikoloj por tiu teknika verkaĵo. Ĝin ricevis ĉiuj membroj de TAKE. Ĝi estas ankaŭ aparte akirebla por 6 eŭroj (sendkostoj inkluzivitaj).
Nia propono: se vi pagas 12 eŭrojn, vi ricevos la libretan **JARKOLEKTO de TAKE 2007** kaj estos membro de TAKE por 2008.

Bronislav ĈUPIN (RU) (red.)	Antaŭparolo
Uroš Bohinc, Boštjan Brank (SI) pere de Đorđe OBRADOVIĆ (SI)	Kiel densa estu la reto de finelementoj en la statika analizo de liniaj strukturoj?
Zlatko Hinšt (HR)	Problemo de signifoj de fervoj-fakaj terminoj – ekzemploj el relvoja kons- tru-tekniko –
SHEN Chengru (CN)	“Akvo-kubo” perfekte briligas ĝian as- pekton de magia membrano –
Tania Berger (AT)	La kvar principoj de la koncepto de Pasivaj Domoj –
Jan Werner (CZ)	Jan Kaplický kaj organisma arĥitekturo

Aliaj ofertoj de TAKE:

(Ĉiuj prezoj entenas la sendo-kostojn)
Teknikaj kajeroj de Gilbert R. LEDON

HERMETIKAJ PUMPILOJ 4,60 eŭroj
(POR MEDIPROTEKTADO)

IKARO NE SONGĜIS

... kial aviadiloj flugas. 4,60 eŭroj

MANEKENOJ KAJ NI 4,60 eŭroj

KONSTRUU VIAN DOMON 4,60 eŭroj

Familia lingvo ESPERANTO 3 eŭroj

JARKOLETO de TAKE (libretoj en
formato A5)

2005 68-paĝoj 9 aŭtoroj
redaktis Jan Werner 5 eŭroj

2006 104-paĝoj 7 aŭtoroj
redaktis Fabien van Mook 6 eŭroj

Pagoj: ĝiroj je la nomo de TAKE
CCP 2 549 46 A Strasbourg
aŭ ĉekoj je la nomo de TAKE sendata
al nia kasisto André Grossmann


**SUKERFARADO - SUKER-
FARILOJ -**

SUKERFAREJOJ 7,65 eŭroj
(provo de klarigo kaj de faka ter-
minaro) de Claude LONGUE
ÉPÉE

La aŭtoro (kreinto de la suker-
fabriko) klarigas fak-sperte, sed en
popularscienca stilo, la fabrikadon
de betsukero. La libron ilustras tre
klaraj teknikaj desegnoj.

Du diskoj de *Persone* estas senkoste haveblaj...

Du albumoj de la fama muzik-grupo *Persone* estas senkoste elŝuteblaj ĉe la retejo <http://bertilow.com/persone>
Ne-komerca kaj senprofita kopiado kaj disvastigado estas tute permesataj.

**** En la spegulo**

La albumo "*En la spegulo*" estas la dua albumo de *Persone*. Ĝi estis eldonita kiel kasedo en 1991. Tiam *Persone* jam konsistis el la nunaj tri membroj: *Martin*, *Anders* kaj *Bertilo*. *Persone* mem reeldonis la albumon kiel k-diskon, kun multe pli bona sono ol la origina kasedo.

**** Povus esti simple**

La albumo "*Povus esti simple*" estas la tria albumo de *Persone*. Ĝi estis eldonita en 1996 kiel k-disko. Ĝi enhavas 13 pecojn inkluzive unu akustikan kanton: "*Nun mallumas ekstere*".



Kaj la albumo "*En la spegulo*" kaj "*Povus esti simple*" estas jam delonge elĉerpitaj, sed ambaŭ ili estas elŝuteblaj senkoste kiel torrento (per programo kiel *BitTorrent* k.s.) La torrento enhavas la tutan albumon kiel wav-dosierojn, tial la elŝutaĵo estas tre granda, sed kompanse la sonkvalito estas la sama kiel en la k-disko mem (= **plena k-diska kvalito**).

Rimarku, ke la torrento-elŝuto estas ankoraŭ iom eksperimenta. Estu do pacienca.

Kaj "*En la spegulo*", kaj "*Povus esti simple*" estas aŭskulteblaj ankaŭ ĉe *Ipernity*:

<http://www.ipernity.com/home/bertilow>

Ipernity-membroj povas elŝuti la dosierojn ankaŭ tie.

La du albumoj estas elŝuteblaj ankaŭ kiel *MP3-torentoj* kun bona kvalito, sed signife malpli granda dosiera amplekso:

<http://thepiratebay.org/tor/3820236>

<http://thepiratebay.org/tor/3820298>

... ni provu



rideti!...

Jus finiĝis la taga lernotempo. La eta Johano, naŭjaraĝa, aŭdas viran voĉon el senmova veturilo antaŭ la larĝa malfermita kradporto :

"Saluton knabeto, envenu !...".

Roberto mienas, kvazaŭ li nenion aŭdintis kaj ekpiedumas rapide sur la trotuaro. La veturilo sekvas...

"Nu, enaŭtiĝu, frandigan ĉokoladon mi havas...".

Sama sinteno de la etulo, kiu daŭrigas sian rapidan piedradon...

Denove la voĉo malantaŭe :

"Ĉokolado, kun krakantaj aveloj ene !...".

Subite Roberto ekkuras, elektas dekstran straton... Vane ! Akcelas la veturilo kaj haltas apud la knabeto... Grumbblas la viro ĉe la stirilo :

"Nu, diru do, kion ci deziras, eble vesperon ĉe cirko ?...".

Okulumante ĉirkaŭen por vidi ĉu iu rigardas, Roberto alparolas la viron...

"Papa, kiomfoje mi diris al vi ne veni kapti min post la lernotempo, stirante tian malnovan, vere ridindan veturilaĉon !"...

La dommastrino fieras konstati, ke la gastoj pli ol aprezas la fiŝaĵon, kiun ŝi mem kuiris. "Kaj plue, kaptis ĝin mia edzo frumatene !".

Tiumomente unu el la invititoj ridetas kaj forprenas etan metalmedalon el sia telero...

"Hej, tute certe okazis internacia festo ĉe la fiŝfamilio, kie li kutimas sin provizi !... Sur tiu metalinsigno mi ja legas Norvegio !"...

Farmisto, kies ĉevalo subite malsaniĝis, petis viziton de veterinaro.

"Nu, temas pri danĝera bakterio, kiu povas infekti la tutan stalon... Jen kuracilo ! Se post tri tagoj tio ne efikas, vian beston ni devos buĉi".

Ĉion aŭdis la najbara porko, kiu admonis la ĉevalon... "Stariĝu, amiko, provu... fortostreĉiĝu !". Sed la besto kuŝis senmove post la engluto de la kuracilo. Tutsame la duan tagon...

La porko pli laŭte avertis :

"Nu, stariĝu, mi certas, ke ci kapablas... Se ne, morgaŭ ili buĉos cin !"

La trian tagon, miraklo !... Je vizito de la veterinaro, staris la ĉevalo sur siaj kvar piedoj !

Tiom ĝojis la farmisto, ke li ekkriis :

"Mirinde, ni festu la eventon !... Morgaŭ mi buĉos la porkon kaj mi invitas vin jam frandi unu pecon !..."

Du muziŝatantoj sidas unu apud la alia en koncertsalono.

« Mi ne konis tiun sonaton de Mikaelo Renkoviĉ... La du unuaj movimentoj estas ja terure tristaj !

- Klarigeble... Lia edzino, el kiu li deziris sin apartigi, decidis ne foriri, kiam li komponis ilin !

- Sed la tria estas tute neeltenebla !

- Bedaŭrinde, lia edzino, kiu intertempe estis tamen forinta, revenis dum li ellaboris la trian komponaĵon ! ».



Hispana komercisto malkovras en Parizo tipan restoracion, kiu elvokas lian Andaluzion.

Pli ol kontenta li sidiĝas kaj la vokita kelnero, kiu verŝajne originis el Ĉinio, serveme, aŭfale alportas sinsekve la postulitajn manĝaĵojn kaj eĉ babilas pri la hodiaŭaĵojn...

Pagante la ŝuldon, la kliento ne kaŝas sian miron al la restoraciestro.

"Nu, vere unika, via ĉina kelnero, li tute perfekte scipovas nian lingvon !

- Ŝŝŝtt ! Mallaŭte mi petas... Lin sendis al mi hotellemejo de Pekino por dujara staĝo... Li daŭre kredas, ke li parolas france !".

Eduardo rivelas al amiko :

"La troa tabakuzado tute malaperigis al mi la gustoĝuadon. Finfine, mia edzino sukcesis persvadi min ĉesigi tiun drogobezonon, kaj post iom da tempo mi kapablis denove identigi ŝiajn kuirajojn...

- Kaj ?...

- Mi denove fumas !...".



Sincere dirite, cu vi ridetis?



Iu fak-advokato pridemandas klienton :

"Kial do deziras via edzino divorci? "

- Hem, fakte mi hezitas riveli tion al vi...

Kulpas ja miaj genuoj!

- Viaj genuoj? Klarigu!

- Mia edzino vizitis min neatendite en mia oficejo, kaj tiam ne sidis mia sekretariino sur sia seĝo!".

Estonta paraŝutisto, kiu trejnadas devas sperti la unuan konkretan

« eventon ».

La instruanto klarigas :

"Tuj post kiam vi saltis eksteren, vi tiru la blaŭnan mantenilon... Se tio ne funkcias, tiru la ruĝan... Vi alteriĝos en rubo-kampon apud bosko en kiu kaŝiĝas biciklo, kiu ebligos al vi reatingi la kazernon".

La staĝano eniras la aviadilon, li saltas je la fiksita oportuna momento, kaptas la blaŭnan mantenilon, tiras sen rezulto. Li do tiras la ruĝan kun la sama negativa rezulto... Tiam li eksklamas : "Ve ! Se mia hodiaŭa malbonŝanco daŭras, mi vetas, ke mi malfacile malkovros la kaŝitan biciklon !".

"Paĉjo, kio estas heredeco ?

- Tutsimpla ekzemplo por klarigi al ci...

Se mi ne povintus ricevi infanon, ankaŭ ci ne povus".

Alparolante la klaŭnon, la cirko-direktoro konsilas :

« Vi devus iomete poluri vian prezentadon. Jam de unu jaro vi kontentiĝas eniri vian etan aŭtomobileton kun via edzino kaj viaj ok infanoj... Eble oportunus aĉeti alian ankoraŭ pli malgrandan ?

- Ne necesas, sinjoro Direktoro, mia edzino atendas triĝemelojn ! ».

« Aŭkultu, karulo mia... Ni priatentu niajn konversaciojn. Nia eta Johano komencas starigi strangajn demandojn !...



- Nu, ekzemple ?

- Li deziras scii, kial mi edziniĝis al ci ! ».

Erik, sepjaraĝa, eniras la lernejon kaj disdonas bombonojn ĉirkaŭen... Eĉ la instruistino ricevis du !


"Nu, Erik, kion ci tiamaniere festas ?

- Hodiaŭ matene, je la sepa kaj dudektri minutoj, mi fariĝis frato !".



jarfina konkurso

Ni elektos lote inter la solvintoj de la du ĉi-subaj enigmoj tiun, kiu ricevos libron de nia libro-servo (tri titoloj proponotaj). Limdato por enpartopreni: 30a de januaro 2008.



Vertikala enigmo ———— ✪

Helpe de la ĉi-subaj vorteroj alfabete ordigitaj, malkovru la 26 vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, donos humuran citaĵon de Pierre Dac

ab aĉ ag aĵo ak an an ar ba bu ci cir di en er ep for fu fu ga ĝi if in io iz jo ke kio ko ko la la le li li lo lo ma ma man mi mo ne neo ni nie no no of ofi oli ome or oto prur re ri ro ro ro ru sa so so ta ti to zeŭ zi

- | | | | | | | |
|----|---|---|---|---|---|-------------------------------|
| 1 | + | - | - | + | - | karesformo de Mario |
| 2 | + | - | - | + | - | fuŝa ago |
| 3 | + | - | - | + | - | fungo kreskanta sur roko |
| 4 | + | - | - | + | - | rapide forlasi lokon pro timo |
| 5 | + | - | - | + | - | haŭta afekcio |
| 6 | + | - | - | + | - | rondforma spektaklejo |
| 7 | + | - | - | + | - | ekzistanta tute interne |
| 8 | + | - | - | + | - | gastropodo |
| 9 | + | - | - | + | - | malamegi |
| 10 | + | - | - | + | - | japana kalkulilo |
| 11 | + | - | - | + | - | bongusta frukteto |
| 12 | + | - | - | + | - | ilo por movi boaton |
| 13 | + | - | - | + | - | nomo de armea estro |
| 14 | + | - | - | + | - | antikva boato |
| 15 | + | - | - | + | - | procedo de dekoracio |
| 16 | + | - | - | + | - | 90° |
| 17 | + | - | - | + | - | surolimpa dio |
| 18 | + | - | - | + | - | apartigado de la aliaj |
| 19 | + | - | - | + | - | manĝaĵo de herbo aŭ legomo |
| 20 | + | - | - | + | - | katolika festo |
| 21 | + | - | - | + | - | konfuzkontura |
| 22 | + | - | - | + | - | sekse impulso ĉe homo |
| 23 | + | - | - | + | - | ne akcepti |
| 24 | + | - | - | + | - | socipolitika idearo |
| 25 | + | - | - | + | - | konfuza voĉbruo |
| 26 | + | - | - | + | - | malrespekti (sento) |




"Pierre DAC (1893 - 1975), verkisto kaj kanzonisto. Lin oni nomis " Reĝo de l'absurdeco ". Li ja famiĝis pro siaj frenezaj aforismoj kaj gazet-anoncetoj. Li estis cetero ĉefredaktoro de humurplena gazeto " la ostoj... kun medolo " Dum la dua mondmilito, en Londono, li iniciatis kaj enpartoprenis radioelsendojn, en kiuj " Francoj alparolas Francojn ". l

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14
N	E	D	I	Ĉ	I	A	A	L	N	Ĉ	A	A	O
S	E	I	I	I	I	N	E	P	O	E	I	I	S
U	T	N	L	L		O	L		P	E	N	O	
	U	T		O						V	V	S	

Solvoj de la lastaj enigmoj - ("La Informilo" 139)

- 1/ vertikala : *La homoj konstruas tro da muroj, dum pontojn oni bezonas.*
- 2/ mistera : *Ne prokrastu ĝis morgaŭ tion kion vi povas fari postmorgaŭ.*



Literojn de la supra krado vi ŝovu en la malsupran. Vi povos legi alian aforismon de Pierre Dac.



malkovru la francan partoprenantaron !...



... malstreĉiga etoso en Saâles ...